

中國報道

EL POPOLA

ISSN 0032-4361


10

1989

ĈINIO



- NOVAJ GRENBAZOJ DE ĈINIO
- LA HODIAŬAJ SHU-VOJOJ (III)
- TRI SAMAGULOJ



NOVAJ KONSTRUAĴOJ EN PEKINO

Foto de HUANG LUKUI



En la pasintaj dek jaroj la konstruado de Pekino iris rapide. Aperis multaj novaj etaĝdomoj, stratoj kaj trefkruciĝaj aŭtovojoj, tiel ke mildiĝis troloĝateco kaj trafika streĉeco. La foto montras parton de Pekino.



INTER NI

Koran dankon pro la granda murtapiŝo, kiun mi ricevis bonorde antaŭ kelkaj tagoj. La pandoj rememorigas al mi vian belan rakonton "Granda pando vizitis mian hejmon", kiu tiel gojigis miajn infanajn genajbarojn. Vere, por ni, pandoj simbolas ne nur Ĉinion, sed ankaŭ ian fabelan paradizon.

Eĉ se mi ne estus gajninta la unuan premion, partopreni vian konkurson estus plezuro por mi, ĉar eblis relegi interesajn artikolojn el via ŝatata revuo. En la ĉi-jara n-ro 5, mi legis artikolon (p.36) pri via mondfama regiono de kalkŝtono en Guangxi, kiu iom similas la karstan regionon en Jugoslavio. Ĉu eblus per "El Popola Ĉinio" pli scii pri tiu natura belaĵo?

H.FALK (Belgio)

Interesaj estas artikoloj pri disvolvo de ĉina ekonomio, E-movado kaj precipe de Esperanta aplikado en scienco kaj tekniko. La artikolon el n-ro 10/1987 "Ĉinio: Aplikado de Esperanto en scienc-teknika kampo" mi tradukis ĉehen kaj sendis kun diversa enkonduko al redakcioj de niaj tri fakaj gazetoj. Longe nenio okazis, sed tamen en n-ro 11/1988 de Automatizace estis la artikolo publikigita. Ankaŭ el tio videblas, ke la reciprokaj rilatoj kaj intereso-
soj pliboniĝas.

JOSEF VOJAČEK (ĈSSR)

Senhezite mi legis la aktualan artikolon pri "Tibeto hieraŭ kaj hodiaŭ", mi malŝatas la ribelojn de la ekstremuloj, kiuj obstrukcas la pluan evoluon de la iama feŭdala Tibeto.

J. DITTRICH (DDR)

ENHAVO

- 6 **Novaj Grenbazoj de Ĉinio**
- 25 **La hodiaŭaj Shu-vojoj (III)**
- 10 **Entrepreno kune administrata de Ĉinio kaj Usono**
- 14 **LIBERA FORUMO DE EMINENTAJ ESPERANTISTOJ:**
Mondkoncepto, Religio kaj Esperanto
- 16 **ESP-NOVAĴOJ**
- 24 **POR KOMENCANTOJ:**
Ses Feniksaj Ovoj
- 34 **SUR NIA LIBROBRETO:**
"Sub Cirkotendo"
- 35 **Vizito al la Unua Konsultiĝa Institucio pri Psiko de Pekino**
- 17 **INTERVJUOJ:**
Tri samaĝuloj
- 30 **ĈINA LITERATURO:**
Jingyang-monteĝo
- 59 **LA IMPERIESTRAL PALACO (5):**
La haloj Zhonghe kaj Baohe
- 48 **Nova Terapio pri Brulvundo**
- 44 **POR VIA SANO:**

- Korposanigaj metodoj (IX)
- 52 **Patrino kaj filino, fortaj flugpilkistinoj**
- 37 **LAŬ LA SUDA SILKA VOJO:**
Xianggong-montaro kaj Dadu-rivero
- 54 **Originalaj naciaj kostumoj**
- 41 **La Pitoreskejo Hailuogou**
- 45 **En granda urbo**
- 57 **Chongqing-a huoguo**
- 4 **INTER NI**
- 50 **KURANTAJ AFEROJ**
- 15,33 **KORESPONDI DEZIRAS**

SUR LA KOVRILO:

Turniĝado (Sceno el pekina opero)

Foto de **WU GANG**

2 **Novaj konstruaĵoj en Pekino**

Foto de **HUANG LUKUI**

4 **Fiŝoj kaj lotuso**

Foto de **LIU SIGONG**

23 **Sani-oj**

SUR LA DORSKOVRILO:


[ĈINAJ POŝTMARKOJ]

Memorigaj poŝtmarkoj por la Nacia Tago

de **YAN JIN**

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

- 1. Gaocheng-gubernio
- 2. Hailuogou
- 3. Chongqing
- 4. Tianshui
- 5. Hangzhou





Novaj Grenbazoj de Ĉinio

de GAO WENHUA kaj ZHENG ZHENJIE



Grena bazo de Heilongjiang en tritik-rikolta sezono

CINA proverbo diras, ke la homo vivas de greno. Tamen la grenproduktado de Ĉinio ne tute kontentigas la bezonojn de ĝiaj 1.1 miliardoj da loĝantoj. La jara grenproduktokvanto de Ĉinio en 1949 estis 200 milionoj da tunoj, tiu en la 70-aj jaroj — 300 milionoj da tunoj kaj tiu en la mezo de la 80-aj jaroj — 400 milionoj da tunoj. Poste, la grenproduktado ĉiam restis sur la nivelo de 400 milionoj da tunoj. Antaŭ nelonge, respondeculo de la Agrikultura Ministerio de Ĉinio diris, ke je la fino de la kurranta jarcento la grenproduktokvanto de Ĉinio devos pliiĝi je 100 milionoj da tunoj por teni la nunan pokapan meznombro de greno. Malfacile imageblas, ke la problemon por kovri tiel grandan kvanton da greno oni solvos ekskluzive per importado. Sekve, ĉiamaniere pliiĝi produktokvanton de greno estas afero multe zorgata de diver-

Rikolto de tritiko en Haining, Zhejiang-provinco



saj rondoj en la ĉina socio.

Por tio la ĉina registaro faris multajn paŝojn en la kamparo, kiel plivastigi kultiveblan teron, altigi la aĉetprezon de greno, kotonon kaj manĝoleo kaj pliigi agrikulturan investon. Unu el ili estas ekspluati aron da novaj grenaj bazoj.

En la periodo de la Sesa Kvinjara Plano (1981-1985) Ĉinio provis funkciigi grenajn bazojn. En la unuaj tri jaroj de la periodo de la Sepa Kvinjara Plano (1986-1990), resuminte la sperton pri la provo, la ŝtato kaj lokaj registaroj kune investis 1.242 miliardojn da juanoj kaj ekspluatis 111 grenajn bazguberniojn, 74 kotonajn bazguberniojn, 113 bazguberniojn de bonkvalitaj agrikulturaj produktoj kaj 278 bazojn de agrikulturaj produktoj plej fame konataj.

Kvankam la ĉina agrikultura produktado denove stagnis pro iuj kaŭzoj en la unuaj tri jaroj de la periodo de la Sepa Kvinjara Plano, precipe en 1988, tamen plejparto de la 111 grenaj bazgubernioj akiris riĉan rikolton, ekz., la grenaj bazgubernioj Quanzhou (Ĉjüanĝou) kaj Lingui en la Guangxi(-Güangŝji)-a Güang-nacia Aŭtonoma Regiono, kies grenproduktok-

vanto pliigis je 6.7% en 1988, kompare kun tiu en 1987. En 1988 Hunan-provincon trafis sekeco kaj inundo maloftaj en la historio, la totala grenproduktokvanto de la provinco malkreskis je 0.5 miliardo da kilogramoj, kompare kun tiu de la antaŭa jaro, dum la totala grenproduktokvanto de Ningxiang (Ningŝjang), Xiangtan (Ŝjangtan) kaj aliaj kvar grenaj bazgubernioj pliigis je 2.18%, kompare kun tiu de la antaŭa jaro, kaj atingis 3.7 miliardojn da kilogramoj. Laŭ statistiko, en 1987-1988, pro diversaj kaŭzoj, la kultivebla tero de la grenaj bazgubernioj malkreskis je 80 000 hektaroj, sed ilia totala grenproduktokvanto konsistigis 9.8% de tiu de la lando en la sama periodo, kaj la kvanto de la greno konsistigis 15.6% de tiu de Ĉinio.

Por persone esplori pri grenaj bazgubernio, ĉi-somere ni venis speciale al Gaocheng(Gaŭĉeng)-gubernio de Hebei-provinco, unu el la ok grenaj bazgubernioj de la provinco.

Gaocheng situas en Jizhong(-Ĝjiĝong)-ebenaĵo. La gubernio posedas 56 000 hektarojn da agroj, kaj tritiko kaj maizo estas ĝiaj ĉefaj agrikulturaj plantoj. Ĝi estis

difinita kiel grenaj bazgubernio en 1987. En 1988 la hektara meznombra tritik-produktokvanto atingis 4 560 kg. Kaj en la kuranta jaro, ĝi atingis 5 625 kg.

Nia aŭto kuris en la gubernio. Tra fenestro de la aŭto ni vidis maron da kampoj kun ondanta orflava tritiko. Guberniestro Dong Yinsheng (Dong Jinŝeng) diris al ni, ke por pli bone ekspluati la gubernion, en la lastaj jaroj la ŝtato kaj lokaj registaroj pliigis la investon por agrikulturo, kaj la gvidantoj de la gubernia, distrikta kaj vilaĝaj registaroj turnis grandan atenton al la agrikultura produktado kaj havis siajn ekzemplajn kampojn. S-ro Dong respondecas pri kulturado de 600 hektaroj da ekzemplaj kampoj kun la celo ĝustatempe malkovri kaj solvi problemojn en gvidado de la produktado. Kaj krome, sur tia kampo oni ankaŭ prove kultivas novan rason de greno, praktikas novan teknikon de gren-produktado por serĉi vojon al stabila kaj alta produktado de greno.

La ekzemplaj kampoj de guberniestro Dong sterniĝas en la distrikto Zhangjiazhuang (Ĝangĝjagüang) 20 kilometrojn for de la

Sur draŝejo



guberniurbo. Sur la ebenaj kampoj prospere kreskis tritiko. Li, 44-jara, diplomiĝis el alta lernejo en la 60-aj jaroj. Li laboris en la gubernio jam 19 jarojn. Li bone scias pri agrikulturo, tial ĉiam kreskas la produktokvanto de lia ekzemplaj kampoj. Laŭ antaŭkalkulo, la hektara meznombra produktokvanto de tritiko superos 7 500 kg en la kuranta jaro. Kiam ni demandis lin pri la kialo de alta produktokvanto, li montris al ni diagramon, kiu prezentas agrikulturan scienc-esploran maŝaron pri kultivado de bonaj specoj, protektado de plantoj, mezurado de grundo, scienca eksperimento kaj popularigo de scienc-esploraj atingoj en praktiko. Por rapide popularigi novajn teknikojn en agrikulturo, la gubernio investis 1.2 milionojn da juanoj kaj fondis agrikulturan mezlernejon kaj kvar agrikulturajn teknikajn lernejojn. Samtempe kun tio, ĝi ekipis ĉiujn distriktojn per kompleto da aŭdvidaj aparatoj kaj materialoj por instruado de novaj agrikulturaj teknikoj. En vesperlernejo oni faras al la kamparanoj teknikan trejnadon, tiel ke la lernintoj akiris rimarkindan progreson en teknika klereco. En la ĉambro de mikrokomputiloj de

Antaŭ grentenejo



Gvidantoj kaj fakuloj de agrikultura departemento sur tritik-kampo de Gaocheng

la centro de teknika popularigo de la gubernio, ni vidis, ke teknikistoj faris studon pri akvumo kaj sterkaĵo de tritiko. Antaŭ nelonge, gvidate de supera scienc-esplora fakulo, la gubernio elkulturis novajn hibridajn specojn de tritiko n-ro I kaj n-ro II. La specoj sin karakterizas per malalta tigo kaj granda spiko. La hektara meznombra produktokvanto de tiuj specoj pliiĝas je 1 500-3 000 kg., kompare kun tiu de la ordinara.

Ni vidis, ke sur vojoj inter kampoj kuris aŭtoj kaj traktoroj. Ĉe vilaĝoj, sur draŝejoj kaj en kortoj de kamparanoj staris mez- kaj malgrandaj falĉomaŝinoj kaj draŝmaŝinoj. Nun en la gubernio ili estas ĝenerale uzataj maŝinoj por rikolti kaj draŝi tritikon.

Sur la tritika kampo de la vilaĝo Mazhuang (Maĝuang) ni intervjuis kamparanon Li Chunji (Li Ĉunĝji). Li diris al ni, ke lia familio havas 4 membrojn. La du infanoj vizitas lernejon kaj lia edzino okupiĝas pri dommastrumado. Pasintece, li opiniis, ke agrokulturo donas malaltan profiton, kaj okupiĝis pri transportado. Post kiam la gubernio estis difinita kiel grenna bazgubernio, li memvole for-

lasis la okupon kaj laŭkontrakte ekkulturis 7 hektarojn da agroj. Li aĉetis traktoron, falĉomaŝinon kaj draŝmaŝinon. En ĉefsezono li plenenergie faras kamplaborojn kaj post ĉefsezono li entreprenas flankokupon. Ĉiujare la familio enspezas pli ol 10 000 juanojn. Li diris al ni, ke li produktas ĉ. 80 tunojn da greno jare. Rezervinte sufiĉe da greno kiel semon manĝaĵon kaj brutonutraĵon, la restan parton li vendis al la ŝtato. Laŭ kalkulo, se li vendus altpreze la grenon en merkato, ĉiujare lia enspezo estus 10 000 juanojn pli granda ol la nuna. Sed li ne faris tion, dirante: "La ŝtato helpis al ni kamparanoj ekspluati grenan bazgubernion, ĉu ni povas forgesi la ŝtaton?"

Reveninte de la gubernio, ni informiĝis, ke la ŝtato investis 380 milionojn da juanoj por ekspluati pliajn 80 grenajn bazguberniojn en nordokcidenta Ĉinio, suda Ĉinio kaj grenmankaj provincoj. Krome, la ŝtato investos ankaŭ 45 milionojn da juanoj por starigi 70 bazojn de bonaj specoj. Post la fondiĝo de tiuj bazoj oni liveros ĉiujare 150 milionojn da kilogramoj da rizaj, maizaj, tritikaj kaj terpomaj hibridaj semoj. ■

Entrepreneo kune administrata de Ĉinio kaj Usono



Prilaboro de ĉinaj modeliloj

La muntejo de la kompanio

ANTAŬ kelkaj jaroj mi estis altirita de televida reklamo.

La reklamo rekomendis pekinan ĵipon. Ĝi estas kun bela klarigo, tamen min profunde impresis pekina ĵipo per sia originala formo, bona funkcio kaj ĉarma koloro.

Julie de 1989 mi vizitis ĝian produktojn — la Limigitan Kompanion de Pekina Ĵipo.

Finfine mi konis la historion de pekina ĵipo. Ĝi estis nova produktaĵo de la Usona Aŭto-Korporacio,






Kontrolo de la kvalito de ĵipo

farita en 1983. Ĝiaj projektado, produktado kaj kvalito plene montras la plej novan teknikon de fabrikado de nuntempaj aŭtoj. Ĝi povas bone kuri en kamparo kaj donas komforton kiel personaŭto.

Aŭtoprojektita de Usono estas produktata de la ĉina fabriko. Tio estas nova situacio aperinta post la

Ĉinaj kaj usonaj laboristoj



Pekina ĵipo en la Pekina Internacia Foiro de Aŭtoj





Usona specialisto kontrolas la kvaliton de veldado.

ekpraktikado de la politiko de “reformado kaj pordo-malfermo”.

La 5-an de majo 1983 la Pekina Aŭto-Fabriko subskribis kontrakton kun la Usona Aŭto-Korporacio pri kuna entreprenado de la Limigita Kompanio de Pekina Ĵipo. La totala sumo investita de ambaŭ flankoj estas 152.33 milionoj da usonaj dolaroj kaj la kontrakto validas por 20 jaroj.

POR ALTNIVELA PRODUKTAĴO KAJ MOVOTEKNIKO

La Pekina Aŭto-Fabriko estas ĉefa produktejo de malpezaj aŭtoj de Ĉinio. Ĝi estas landfama per 20-jara produktado de preskaŭ 300 000 aŭtoj de tipo BJ 212. Kvankam tiaj aŭtoj trovis klientojn, tamen ilia konkurenca kapablo en la internacia merkato ne estas granda pro projektado malnova, speco monotona kaj teknologio postĝinta. Kun manko de tekniko, kapitalo, talentuloj kaj bona administra sperto, la fabriko decideme iris sur la vojon transformi la malnovan entreprenon per sia kaj alilanda kapitalo.

Chen Xulin (Ĉen Ŝjulin), ĉefdirektoro de la kompanio, diris: “Antaŭ ĉio ni elektis bonan kunlaboranton. Tiutempe la Usona Aŭto-Korporacio havis riĉan sperton en produktado de ĵipoj kaj la unuagradajn produktaĵojn, kaj la Pekina Aŭto-Fabriko ĉiam produktis kampajn aŭtojn. La komunaj interesoj kunligis ilin.”

Due estas “enkonduko de altnivela produktaĵo kaj movotekniko”. Kial oni diras “enkonduko de altnivela produktaĵo”? Mi informiĝis, ke post la fondiĝo de la kompanio la direktoraro decidis preni CJ-seriajn aŭtojn produktitajn de la Usona Aŭto-Korporacio kiel bazon por kune projekti novtipan aŭton. Post duonjaro la novtipa aŭto estis projektita. Neatendite, CJ-seriaj aŭtoj estos eventuale elkribrita de la internacia merkato. Oktobre de 1984 Wu Zhongliang, la ĉina estro de la direktoraro de la kompanio, gvidis delegacion por partopreni en la speciala direktora kunveno en Usono. Post kiam ili venis al la mondfama aŭto-urbo Detroit, ili tuj estis altiritaj de XJ-seriaj Cherokee-aŭtoj, nova produktaĵo farita de la Usona Aŭto-Korporacio en 1983 kaj honorita

de tri usonaj pri-kampaŭtaj gazetoj kiel “plej bona aŭto en la jaro”. Wu Zhongliang pensis: “Se ni volas, ni produktos altklasajn aŭtojn samtempe kun Usono.” En la speciala kunveno ambaŭ flankoj decidis produkti Cherokee-aŭtojn anstataŭ la planitajn kaj unue munti aŭtojn per usonaj pecoj kaj iom post iom per la ĉinaj. Ili nomis tian aŭton pekina ĵipo.

En 10 monatoj la kompanio starigis produktoliniojn de veldado, ŝpruclakado, garnado kaj muntado, importis 105 avangardajn ekipaĵojn, mem faris 3 000 specojn da kompletigaj pecoj kaj 120 kompletojn da instalaĵoj kaj ekhavis kapablon produkti 7 000 pekinajn ĵipojn ĉiujare. La 26-an de septembro 1985 la unua pekina ĵipo estis sukcese farita.

Enkonduko de movotekniko signifas, ke laŭ la ĝenerala kontrakto de la kompanio la usona flanko partoprenigas sian teknikon en akcio kaj respondas pri senĉesa transigo de siaj nuna kaj estonta tekniko en la tempo de valideco de la kontrakto. Tio senĉese donas movforton por la teknika progreso de la kompanio.

5 JAROJN POST LA KOMENCO DE LA KUNA ADMINISTRADO

Ĝis 1989 la Limigita Kompanio de Pekina Ĵipo funkciis 5 jarojn. Kiaj ŝanĝoj okazis al ĝi en la 5 jaroj?

Antaŭe la Pekina Aŭto-Fabriko kun pli ol 11 000 laboristoj ĉiujare produktis 17 500 malnovtipajn aŭtojn BJ 212 kaj ĝia jara pokapa produktiveco estis 28 297 juanoj. Post la fondiĝo de la kompanio pli ol 4 000 laboristoj de la malnova fabriko transiris al la kompanio, kiu ĉiujare produktas 32 000 pekinajn ĵipojn kaj novtipajn aŭtojn BJ 212 kaj kies jara pokapa produktiveco kreskis al 109 700 juanoj. En la 5 jaroj la kompanio pagis al la ŝtato 146.4

milionoj da juanoj kiel imposton. Ambaŭ akciuloj de Ĉinio kaj Usono ricevis dividendon. La mez-nombra monata salajro de la laboristoj kaj oficistoj de la kompanio altiĝis de 99 al 225 juanoj.

La kompanio prenis ĉinan produktadon de pekinaj ĵipoj kiel strategian paŝon de disvolviĝo kaj starigis la Komitaton por Ĉina Produktado de Pekinaj Ĵipoj kaj la Kombinato de Ĉina Produktado konsistanta el 136 kunlaborantaj fabrikoj kaj scienc-esploraj institucioj de Ĉinio. Dank' al ilia senlaca klopodo 30.2% de la pecoj de pekinaj ĵipoj estas produktitaj de Ĉinio.

Samtempe la kompanio aplikis novan teknikon, kreis ĵipojn BJ 212 L kaj tiel finis la historion de 20-jara produktado de ĵipoj BJ 212.

Kompreneble, en ne tre bona ekonomia situacio de Ĉinio ankorau estas malfacile disvolvi kune administratan entreprenon. Post 5 malfacilaj jaroj la kompanio finfine trovis vojon kombini la enkondukitan teknikon de aŭto-industrio kun la ĉina produktado. Ĉinio jam eniris en la mondon kaj ankaŭ la mondo jam eniris en Ĉinion.

SERĈO DE KOMPRENO KAJ KONFIDO

Kio estas la ŝlosilo de la sukceso de la ĉina-usona kunlaboro en la kompanio?

“Reciproka kompreno kaj konfido!” Tio estas la komuna opinio de la ĉefdirektoroj de Ĉinio kaj Usono en ĉiuj periodoj.

S-ro D. St. Pierre estas la tria ĉefdirektoro de Usono. Post plenumo de la ofico li daŭre laboris por kelka tempo. Lin intervjuis ĵurnalisto de Pekino. Sube estis ilia interparolo:

Ĵurnalisto: Vi ĉiam plendas kontraŭ burokratismo de Ĉinio.

Ŝajnas, ke la laborkondiĉoj ne estas bonaj. Kial vi volas daŭre labori en Ĉinio?

D. St. Pierre: Vi starigis bonan demandon. Kiam mi ĵus venis ĉi tien, mi deziris perlabori multe da mono kaj esti promociita. Ju pli longan tempon mi laboris, des pli multajn amikojn mi akiris. Mi pensas, ke mono kaj promocio ne estas plej gravaj. Nun mi volas resti ĉi tie. Mi propraokule vidis, ke la ĉinaj direktoroj renkontis malfacilojn. Ili pene laboras kaj volas fari multon. Mi intencas kuraĝigi ilin ĉi tie.

Ĵurnalisto: Ĉu estas brilaj, malbrilaj aŭ meze brilaj por via tuta vivo tiuj du kaj duona jaroj, kiujn vi pasigis en Ĉinio?

D. St. Pierre: Meze brilaj? Ne! Tiu tempo estas la plej bona kaj plej valora por mia tuta vivo.

Ĵurnalisto: Kiaj estas la kvalito kaj kapablo de la administrantoj de la kompanio? Ĉu vi konfliktas en laboro?


D. St. Pierre: Ni estas en harmonio. Multaj ĉinoj estas tre bonaj, ekz. s-ro Chen Xulin estas la plej elstara. Problemoj okazis ĝenerale al mez- aŭ malsupraklasaj laborantoj, kies kvalito estas

kompare malalta. La ĉefa problemo de la kompanio estas manko de junuloj.

La malkaŝema parolo de s-ro D. St. Pierre estas laŭdinda. En la intervjuo mi informiĝis, ke nun ĉino transprenis la ĉefdirektorecon kaj la usonanoj intence lasis la gravajn postenojn al ĉinoj. Ili volonte laboras kiel konsilistoj kaj specialistoj. Tio montras ilian konfidon al la ĉinoj kaj ilian plenan fidon al la estonteco de la kompanio.

Aŭguste de 1987 la Aŭto-Kompanio Chrysler aĉetis la akcion de la Usona Aŭto-Korporacio kaj fariĝis nova usona akciulo de la Limigita Kompanio de Pekina Ĵipo. La prudenta s-ro L. Acoca alportis novan etoson al la kunlaboro inter Ĉinio kaj Usono. Vizitante la kompanion oktobre de 1988, li diris: “Mi vere havas ian senton krei historion. Tio estas la unua entrepreno de kunlaboro inter nia Chrysler-kompanio kaj la ĉina registaro. Laŭ tio, kion mi vidis, mi povas diri, ke la kunlaboro iras tre bone.” Poste Ĉinio kaj Usono interkonsiliĝis kaj decidis pligrandigi kuman investon. En 1995 ili atingos la celon produkti 150 000 aŭtojn ĉiujare. Tio estas ĝojiga plano. ■

Usonaj specialistoj trejnas ĉinajn laboristojn.



Mondkoncepto, Religio kaj Esperanto

de BRUNO VOGELMANN* (F.R. Germanio)

KIUJ rilatoj ekzistas inter mondkoncepto, religio kaj Esperanto?

Ĉu Esperanto ne estas unuavice helpilo por transpaŝi la lingvajn barojn? Tiel, ke Esperanto estas teknika ilo en plej vasta senco por kontaktigi la homojn kaj ebligi al ili pli bonan interŝanĝon de ideoj kaj spertaĵoj kaj pli bonan komunan agadon. Bone, sed Esperanto estas pli.

Ni hodiaŭuloj vivas en la tempo, kiam la homaro multiĝas pli kaj pli kaj kiam la homaro kunkreskas al grandega organismo. Tial la nuntempa homaro bezonas komunan pensan bazon. La ĝisnunaj mondkonceptoj kaj religioj estas plej ofte mondkonceptoj kaj religioj de grupoj, eĉ se kelkaj el ili postulas universalan validecon por la tuta homaro.

Tia komuna pensa bazo estas formiĝanta ekde kelka tempo. La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, la multaj internaciaj kontraktoj, la strebadoj de multaj internaciaj organizaĵoj, la konvinko de la neceseco de internacia politika organizaĵo kiel la Unuiĝintaj Nacioj, ĉio tio estas kontribuoj por la formiĝo de komuna pensa bazo kaj de tuthomara organismo, kiuj transpaŝas la limojn kaj la diferencojn inter popoloj, rasoj, sociaj ordoj kaj kulturoj.

Aparta baraĵo por la formiĝo de bone funkcia tuthomara organ-



La aŭtoro

ismo estas la lingva baraĵo. Tiu lingva baraĵo povos esti transpaŝata nur pere de tia internacia lingvo, kiu estas disponebla por ĉiuj homoj sen malavantaĝo por iliaj propraj lingvoj, ekonomio kaj kulturo. Pro tiu kialo la naciaj lingvoj ne taŭgas por tiu celo. La utiligo de iu nacia lingvo kiel monda lingvo signifus diskriminacion por ĉiuj alilingvanoj. Krome, ĉiuj malavantaĝoj de la nacia lingvo restus, obstaklo kaj ŝarĝo la estontan evoluon de la homaro.

Apenaŭ necesas ĉi tie mencii la avantaĝojn de la internacia lingvo Esperanto. Tamen mi menciu kelkajn aparte gravajn. Esperanto estas neŭtrala lingvo, do ĝi ne servas unuavice al la avantaĝo de ununura lingva komunaĵo, al ties ekon-

omio kaj kulturo. Esperanto donas al ĉiuj homoj, ankaŭ al tiuj parolantaj totale alimaniere konstruitajn lingvojn, la avantaĝon de simple kaj logike konstruita gramatiko sen esceptoj de la reguloj. Fine Esperanto kontentigas altgrade la bezonojn, kiuj ekestiĝas pro la novaj teknikoj de komunikado, ekzemple, en komputado.

La aŭtoro klopodis formuli en sia verko LA NOVA REALISMO novan mondkoncepton en 47 tezoj. La verko aperis germanlingve en 1988 kaj aperis en Esperanto en la printempo 1989 ĉe la eldonejo de la Flandra Esperanto-Asocio en Antverpeno-Belgio. Kompreneble, li ne "inventis" novan mondkoncepton. Li formulis tion, kio jam estas ekestiĝanta en la konscio de multaj homoj.

La mondkoncepto LA NOVA REALISMO celas "estontecon sen dogmo kaj ideologio" laŭ ĉapitro, kiu havas tiun titolon. Ĝi ankaŭ montras la komunecon inter seriozaj kredantoj kaj seriozaj ateistoj, elŝeligante la kernon de ĉia religio: la konvinkon de la celstrebado kaj senceco de la vivo. Kaj la vivo estas rigardata nia plej alta valoro. Vivo estas laŭ la aŭtoro ĉio ĉirkaŭ kaj en ni, ĉiam movanta, moviĝanta, ŝanĝiĝanta kaj evoluanta, strebanta al celo nekonata al ni. Vivo aperas en formo de anorgana, de basa organa, de animata organa kaj fine de intelektdonita vivo. La granda religia germana pensulo Majstro Ekarto diris antaŭ sescent

jaroj: KIO ESTAS VIVO? kaj respondis: VIVO ESTAS LA ESENCO DE DIO! Li volis diri, ke ambaŭ estas identaj: VIVO kaj DIO.

El tiu kono kaj sperto la Nova Realismo trovas novan etikon, kiu emfazas, ke la homo estas inkludita en la grandioza mondproceso, en la evoluo de la vivo de ŝtupo al ŝtupo, ke ĉiu homo estas ĉenero en la ĉeno de la vivo, kiu etendiĝas de la pasinteco trans la nuntempo al la estonteco. Ĉar la homo ricevis ĉion, kion li havas kaj kio li estas, de la pasinteco, tial la homo respondas pri ĉio. La homo do havas la taskon konservi kaj pluevoluigi la vivon al pli alta ŝtupo.

El tiu etiko kaj responseco sekvas la taskoj de la individua homo, same kiel la taskoj de la tuta homaro kaj de ties grupoj.

La mondkoncepto de la Nova

Realismo ne estas kontraŭ ekzistantaj mondkonceptoj aŭ religioj, escepte se ili estas kontraŭvivaj, vivodetruaj, kiel ekzemple, la nazifaŝismo kun sia rasismo. La NOVA REALISMO inkludas ĉiujn ĝisnunajn mondkonceptojn kaj religiojn kaj agnoskas ilin. Sed ĝi transpaŝas ilin kaj ĝi estas la komuna mondkoncepto de ĉiuj homoj en la mondo.

Por helpi al baldaŭa realigo, konatigi kaj konsciigi tian NOVAN REALISMON, por vekti la konscion pri la neceseco de tia komuna pensbazo, la aŭtoro skribis la libron LA NOVA REALISMO ankaŭ en Esperanto. En aparta ĉapitro li montris la esencon de la NOVA PENSADO kaj li prezentas la regulojn de tiu NOVA PENSADO, kiuj devenas el la sperto kaj estas ellerneblaj.

La vivomaksimo de la NOVA REALISMO estas laŭ la kvardek-sesa tezo:

Agu tiel, ke la celdirekto de via volo estas ĉiam en harmonio kun la konservado kaj suprenevoluo de la vivo!

Tiu vivomaksimo estas—se ni atentis la kernon de la religio—egala al la Granda Ordono de Jesuo Kristo: “Vi devas ami Dion! kaj vi devas ami vian proksimumon kiel vin mem!”

Tezo 47 tekstas jene:

La NOVA REALISMO estas alvoko al la racio, kiu ekkonas kaj juĝas. Sed ĝi estas ankaŭ alvoko al la animo, al la koro de la homo, kiu sentas, valoras kaj partoprenas je ĉio kio okazas.

* B. Vogelmann, honora membro de UEA.

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: unu internacia respondkuponon por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp-organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Membroj de Conchali Esperanto-Grupo dez. kor. tm. Bonvolu indiki nomon, sekson, aĝon, intereson ktp. Adr.: Cristobal Duran Castillo, Cardenal Caro 1506, Conchali, Santiago, Ĉilio.

* 10-40 jaraj geesp-istoj volas kor. tm. Scarpa, Altomonte Esperantejo, Dopolavoro Ferrovia, Rio Reggio Calabria, Piazza Garibaldi, Italio.

* Geklubanoj el urbo Senica en Ĉeĥoslovakio efektiviĝos en novembro 1989 ekspozicion “Esperanto en korespondado”. Ni petas la

legantojn de El Popla Ĉinio kontribui per sendo de salutoj aŭ simile laŭ konsidero. Respondo kun memoraĝo garantiata. Adr.: Esperanto klubo, Dom kultury, 905 01 Senica, Ĉeĥoslovakio.

* AL LA KORESPONDEMAJ ĈINAJ ESPERANTISTOJ.

La ĉinaj esperantistoj, kiuj dez. ricevi adresojn de korespondemuloj povas, ekcepte por la ĉinoj, peti ilin de KORESPONDA SERVO MONDSKALA, sen aldoni respondkuponon, nek poŝtmarkon. Krom NOMO, ADRESO, precizigu AĜON, PROFESION? KIOM DA korespondantoj vi deziras, preferinde el kiuj landoj, pri kiuj temoj. KORESPONDA SERVO MONDSKALA. “Les Hortensias”; 121 bis BOULEVARD NAPOLEON III. F-06200. NTCE. Francio.

* Esperantista klubo “Centro” ĉe municipa konsilio dez. kontaktiĝi kun similaj kluboj por trakti problemojn de komuna intereso kaj spertojn en aplikado kaj aplikigo de Esperanto. Adr.: Obštinki Na-

roden Savet, klub “Centro”, Bojanka Dabova, 9700 Ŝumen, Bulgario.

* Entreprena Kulturdomo, Dom na Kulturata pri MPOA “St. Stamenov”, 9700 Ŝumen, Bulgario, kun entreprenaj kulturdomoj por interŝanĝo de spertoj kaj kunlaboro en kampo de kulturo en laboristaj medioj.

* Esperantista klubo ĉe kulturdomo, Esperantski klub “Metalurgo”, MPOA “St. Stamenov”, 9700 Ŝumen, Bulgario, kun esperantistaj kluboj ĉe entreprenoj por kunlaboro en kampo de aplikado de Esperanto fare de entreprenoj, interŝanĝo de spertoj, lernado de Esperanto fare de laboristoj.

* Pan Linxia, 21-j. fraŭlino, dez. kor. tm. Adr.: Luotong Chejian, Changjishi Mian Fang Zhi Chang, Changji, Xinjiang, Ĉinio.

* Xu Yiping, 36-j, volas kor. tm. pri ĉt., interesiĝas pri literaturo, moro, kaj kolektas filatelaĵojn, librojn kaj E-gazetojn. Adr.: 13-503 Shan Men Xiang, Guan Qian Jie, 215005 Suzhou, Jiangsu, Ĉinio.

ESP-NOVAĴOJ

● Por diskuti pri E-instruo en altlernejoj, la Guangdong-a Alteduka Buroo lastatempe okazigis kunsidon, en kiu oni informis "La resumon de la Simpozio pri la Instruprograme de la Dua Fremda Lingvo Esperanto por Altlernejoj" kaj proponis konkretajn rimedojn por akceli la E-instruadon. La kunsido postulis, ke ĉiuj lernejoj, kie oni instruas Esperanton, altigu la instruon kvaliton konforme al la instruprograme. Ĝi postulis ankaŭ, ke tiuj, kiuj volas funkciigi E-kurson, tamen ne havas necesajn kondiĉojn, devas kulturi instruistojn. La kunsidon ĉeestis reprezentantoj de la Ji'nan-a Universitato, Zhongshan-Universitato, Sudĉinia Instruista Universitato, Guangdong-Normala Instituto kaj la Unua Medicina Universitato de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.

● La 4-an de junio fondiĝis la E-Asocio de la Sud-guizhou-a Boŭjejmajaŭ-nacia Aŭtonoma Subprovinco en Guizhou-provinco. Kun 108 membroj el kiuj 44 estas boŭjejoj, mjaŭoj, suj-oj, ji-oj, dong-oj kaj tu-oj, ĝi estas la tria E-asocio de nacimalplimulta aŭtonoma subprovinco en Ĉinio. La aliaj du estas E-asocio de Changji-huj-nacia Aŭtonoma Subprovinco, Xinjiang kaj tiu de Yanbian-a Korea Aŭtonoma Subprovinco, Jilin.

● Por propagandi kaj disvastigi Esperanton kaj prepari monon por E-movado, maje de 1989, la Guangxi-a E-Asocio fondis la

Guangxi-an Esperantan presejon, kiu jam ekservis al la klientoj.

● Maje de 1989 la Eldonejo de Akademiaj Revuoj publikigis "Biblioteka Terminaro" kompilitan de Doug Portmann (Usono) kaj Koralo (Ĉinio). La terminaro kun pli ol 1 300 terminoj bibliotekologiaj, inform-sciencaj, eldonaj, pres-artaj, dokumentaj k.a. Kun 5-lingva indekso en la fino, la libro estas aranĝita en ordo de Esperanta alfabeto kun samsencaj terminoj anglaj, ĉinaj, francaj, germanaj kaj hispanaj. La libro, montrante novan disvolviĝon de la biblioteka fako, estas la unua plurlingva biblioteka terminaro presita laŭ Esperalfabeto.

● La 24-an de aprilo la Ma'anŝan-a Poŝtoŝejo, Anhui-provinco, ekuzis memoran stampilon en Esperanto por celebri la 40-jaran datrevenon de la liberigo de la urbo. La sekvantan tagon la Changshu-a Poŝtoŝejo, Jiangsu-provinco, emisiis unuatagan koverton en Esperanto kaj uzis memoran stampilon en Esperanto por celebri la 40-jaran datrevenon de la liberigo de Changshu. La memoraj stampiloj kaj unuataga koverto estas faritaj de veterana espisto Zhang Linrui. La 1-an de majo, la Hubei-a E-Asocio emisiis unuatagan koverton kaj ekuzis stampilon en Esperanto por soleni la 30-jaran datrevenon de la fondiĝo de la asocio.

● Profesoro Pandiŝo, honora membro de la konsilantaro de ĈEL



Stampo por la 40-jara datreveno de la liberigo de Changshu sur la unuataga koverto

kaj vicprezidanto de la Ŝanhaja E-Asocio, forpasis la 18-an de majo, 1989, en la aĝo de 80 jaroj.

● Laŭ iniciato de lokaj E-aktivuloj en Samarkando fondiĝis publika Muzeo de Paco kaj Solidareco kiu ekfunkciis en decembro, 1986. En la Muzeo, situanta en la urbocentro, estas eksponataj diversspecaj pacpropagandiloj el pli ol 50 landoj. Nun ĝi kolektas afiŝojn, sloganojn, pentraĵojn, infandesignaĵojn, fotojn, insignojn, gluetikedojn, librojn, revuojn, iumbildojn kaj aliajn materialojn pri batalo de la popoloj kontraŭ militarismo, faŝismo, rasismo, novkoloniismo, por paco, socia justeco kaj progreso.

Bonvolu sendi ĉiujn kontribuojn al:

Museum of Peace and Solidarity, c/o International Friendship Club "Esperanto", P.O. Box 76, 703000 Samarkand, Uzbekistan, USSR.

"Biblioteka Terminaro"



La publika Muzeo de Paco kaj Solidareco en Samarkando, Sovetunio



TRI SAMAĜULOJ

de SUN GUOLIANG

TRI el miaj samaĝaj intervjuoj profunde impresis min. Eble tion kaŭzis, ke ili estas samaĝaj kiel la Ĉina Popola Respubliko. Ili havas malsamajn travivaĵojn, profesiojn kaj hobiajn, sed ia similaĵo de ilia sorto estas edifa.

ORDINARA KURACISTINO

“Kredeble mi estas la plej ordinara el miaj samaĝuloj, sed la vojo de mia vivo ne estis ĉiam glata. Mi nur postulas, ke mi estu konscienca al miaj pacientoj kaj la samaĝa respubliko,” tiel diris al mi kuracistino Liang Guilian de la Tria Hospitalo sub la Pekina Medicina Universitato.

Ŝi devenis de kamparana familio en la gubernio Pinggu sub Pekino. Pro la influo de la feŭdisma “seksa diskriminacio”, ŝi ekvizitis lernejon en la aĝo de 10 jaroj. En 1968 ŝi diplomiĝis el mezlernejo. Ŝi opiniis sin feliĉa, ĉar ŝiaj nemalmultaj kunlernantinoj ĉesis lerni antaŭ la diplomiĝo. Reveninte de la lernejo, ŝi laboris tri monatojn sur la kampo kaj poste komencis lerni veterinaran arton. En la kamparo veterinariĝo de knabino estis vere skandala, sed ŝi tute ignoris la ironiojn. Ŝi opiniis, ke ŝi devas fari ĉion, nur se tio estas bezonata de la kamparanoj kaj subtenata de la ŝtato. En 1969 ŝi fariĝis sanitaristino, alinome “nudpieda kuracisto” de la produkta briga-

do.

“Nudpiedaj kuracistoj’ estis ne regule klerigitaj je medicino, kaj esence ne estis kvalifikitaj kuracistoj. Sed mi ne subtaksis tiun travivaĵon, ĉar tio estis ja rememorinda komenco de mia medicinista vivo. Por esti taŭga nudpieda kuracisto, mi diligente lernis medicinajn sciojn kaj akceptis la pacientojn, kiujn akcepti estas ne dece por fraŭlino laŭ la rutina opinio de la socio.”

Ŝi rakontis al mi pasintaĵon: En ŝia vilaĝo estis maljuna fraŭlo, kiu suferis de konstipo jam plurajn tagojn kaj la ŝvelinta ventro terure doloris lin. En profunda nokto lia najbaro venis peti ŝian helpon. Ŝiaj gepatroj timis pikan klaĉon kaj ne konsentis pro skrupulo, sed ŝi ne timis tion kaj iris, kunportante medikamentan keston. Sed tiutempe ŝi ne havis laksigan medikamenton kaj devis lubriki la anuson per sapsolvaĵo kaj elfoseti fekaĵon per fingroj. Post longa penado ŝi fine kvietigis la suferon de la maljunulo. Ŝi faris vere sensacion en la vilaĝo kaj pliparto de la vilaĝanoj alte taksis ŝian faron.

En la kamparo de Ĉinio fraŭlino ne devas akuŝigi. Sed ŝi tute ignoris la malnovan moron kaj ĉiam estis preta por fari servon.

En 1970 ŝi eklernis en la Pekina Medicina Instituto kaj la tuta vilaĝo ĝojis pro ŝi. En la instituto



Liang Guilian

ŝi estis elstara studentino kaj post diplomiĝo ŝi eklaboris en dermatologia sekcio de la hospitalo.

“Kaj tiam mi vere ektimis. Estis terure rigardi al suferantoj de haŭtaj malsanoj, kaj kelkfoje mi komplete perdis la apetiton dum pluraj tagoj. Sed fine mi kutimiĝis al la laboro, ĉar mi komprenis, ke kuracisto ne devas timi malsanojn kaj devas liberigi pacientojn el la suferoj.”

Vere ŝi estas konscienca kuracisto. Ŝi resanigis multajn pacientojn. Sed ŝi diris modeste: “Nenion distingiĝan mi faris, mi ne indas vian intervjuon.”

Mi pririgardis ŝin: staturo



En malsanula ĉambro

Liang Guilian



Liang Guilian kaj ŝia edzo

Esplorado de malfacila kazo






Zhang Dazhong en fabriko

Zhang Dazhong kaj lia nova laŭtparolilo kun murpentraĵo

Zhang Dazhong

Zhang Dazhong kaj lia edzino laboras hejme.





Zhang Dazhong

nealta, korpo iom maldika, vizaĝo tute ordinara, ne bela, nek turpa. Sed tiu ordinara medicinistino konsciencie plenumas sian oficon.

DIREKTORO EL KOMIZO

Post longa serĉado mi fine trovis sur muro de loĝdomo la elpendaĵon de la “Elektroaparata Kompanio Dazhong, Pekino”. Tie ja estas la hejmo kaj oficejo de Zhang Dazhong, la direktoro de la kompanio. Ĉi tiu privata entreprenisto estas entuziasma, rezoluta kaj tempoŝpara. Informiĝinte pri mia intenco, li diris kun rideto: “Pardonon, ke ni devas interparoli mallonge, ĉar nia interparolado povos esti interrompita en ajna momento.”

Mi konsentis, kaj Zhang Dazhong komencis rakonti pri sia kariero. Li ĝoje kaj senzorge pasigis sian infanecon de 1949 ĝis 1959. En 1960, kiam Ĉinion atakis natura katastrofo, lia patro forpasis. En la “kultura revolucio” lia patrino forpasis pro la persekuto de misakuzo. Li kaj liaj ses gefratoj fariĝis orfoj kaj suferadis de malrespekto kaj ofendo. De 1979 la registaro ekpraktikis la politikojn de reformado kaj pordmalfermo, la konstruado progresis rapide, kaj ankaŭ li, ordinara komizo, fariĝis direktoro de privata kompanio kun kapitalo de

kelkcent mil juanojn.

“Sinjoro Zhang, mi informiĝis, ke antaŭe vi estis ŝtata funkciulo. Bonvolu iom paroli, kial vi rezignis la ŝtatan oficon kaj establis la kompanion?”

Apenaŭ li komencis respondi, sonoris telefono. Li ekridetis al mi kun pardonpeta mieno kaj deprenis la telefonan aŭdilon. Tiu-momente mi pririgardis la ĉambbron, lian loĝejon kaj ankaŭ oficejon. La ĉambro estis moderne instalita per kolora televidilo, fridujo, aŭdiosistemo, klimatizilo, videoaparato, kiuj estas luksaĵoj por ordinaraĵoj ĉinoj. Krome en la ĉambro estis kelke da laŭtparoliloj.

Demetinte la aŭdilon, li tuj respondis al mi: “En 1972 mi fariĝis ŝtata dungito kaj laboris kiel komizo en vendejoj de manĝaĵoj, ĉiutagaj bezonaĵoj, legomoj, fruktoj kaj glaciaĵoj. De infaneco mi estas radioamatoro kaj ĉiam deziris havi interesan profesion, sed mi malsukcesis. En la politiko de la reformado kaj pordmalfermo mi vidis esperon, kaj mi rezignis la ŝtatan oficon en 1982 kaj min ekokupis pri privata entrepreno. En la komenco mi faris el forĵetaĵoj starlampojn. Mi faris ilin nokte kaj kolportis tage. La lampoj kostis ne multe, sed multaj aĉetis de mi, kaj la enspezo apenaŭ povis vivteni min. Foje mia amiko, kiu sin okupis pri radio en iu instituto, informis min, ke lia unuo estas vendanta superfluajn radioaparatajn pecojn. Li konsilis al mi aĉeti certan kvanton da ili kaj fari el ili novajn varojn. Sed tiam mi havis nur

500 juanojn malfacile akiritajn.”

Ĉe tio malsereniĝis lia mieno. Li diris, ke koncerna departemento donis kompensan subvencion al li kaj liaj gefratoj, kiam oni nuligis la maljustan verdikton por lia patrino. Li diris: “Mi akiris 500 juanojn. Mi decidis spezi la sumon por mia kariero por ne vanigi la esperon de mia patrino. Mi aĉetis kvanton da tiaj pecoj per la mono kaj provis fari el ili ‘altfidelajn amplifilojn’ necesajn por aŭdiosistemo. Tiu-tempe en Pekino pluraj fabrikoj faris tian aparaton, kaj mi povis venki la konkurantojn nur per alta kvalito kaj malalta prezo.”

Post nelonge li monopoligis la merkaton de tiu aparato en Pekino. En 1988 li fondis sian privatan kompanion, aĉetis fabrikdomon kun areo de 300 kvadrataj metroj kaj varbis 30 laboristojn. Krome li starigis du butikojn en komerca kvartalo. Nun lia fabriko faras ne nur amplifilojn, sed ankaŭ altklasajn laŭtparolilojn.

Ĉe tio mi komprenis kaj diris al Zhang Dazhong: “Jen kial multaj laŭtparoliloj troviĝas en via ĉambro. Sed ĵus mi pensis, ke vi volis paradi pri via riĉeco.”

Zhang Dazhong volis ion diri, sed eniris kelke da homoj, kaj mi devis adiaŭi.

SUPERA ĈIGONGISTO

Iun matenon mi promenis ĉe la lago Fuhai en la ĝardeno Yuanmingyuan kaj vidis viron sin ekzercanta per ĉina bokso. Li estis mezstatura kaj fortika. Sur lia ovala vizaĝo brilas paro da ne-grandaj okuloj. Lia aspekto impresis per modesteco, entuziasmo kaj saĝeco. Post ekzerco per ĉina bokso li prenis lancon, tenante ĝin je la ekstremo per la meza kaj montra fingroj de la dekstra mano, kaj facile levis ĝin super la

kapon. Lia faro vekis aplaŭdon de la ĉirkaŭantoj. Post demando mi sciis, ke li estas neniu alia ol s-ro Xu Shitian, instruisto de ĉina luktarto *uŝu* kaj *ĉigong* en la Pekina *Ĉigong*-lernejo, kiun mi volis intervjui.

Post reciproka sinprezento ni sidiĝis sur benko.

“Instruisto Xu, per kiu speco de *ĉigong* vi vin ekzercas?” mi demandis.

“Lancolevo per du fingroj.”

“Ĉu estas facile?”

“Bonvolu provi.”

Mi prenis la lancon, imitis lian faron por levi la lancon, sed malsukcesis: Mi eĉ ne povis levi ĝin de la tero.

Xu Shitian diris kun rideto: “Por sukcesigi la levon, oni devas sin ekzerci plurajn jarojn. La lancolevo ŝajnas facila, sed fakte ne.”

“Ĉu mi povus peti vin konigi vian travivaĵon?”

Post momenta medito li komencis sinprezentadon.

“Mi devenis de familio de kuracisto de la ĉina medicino. En la aĝo de 7 jaroj mi komencis parkeri facile memoratajn versaĵojn de la ĉina medicino, kaj mia onklo instruis al mi akupunkturaron kaj kaŭterizon. Pli poste li donis al mi sisteman direktadon. Mia onklo devigis min lerni la ĉinan medicinon kaj precipe akupunkturaron kaj kaŭterizon, sed mi ne interesiĝis pri tio. Mi absorbiĝis en *uŝu* kaj *ĉigong*. La patro de mia patrino devenis de familio de uŝuisto, kaj lia frato estis fama korpogardisto vaste konata en Hebei-provinco, kaj lia dua frato estis oficiro en la kamparana insurekcia armeo Yihetuan. Mi lernis de la avo la ĉinan boksadon

shaolin kaj arton *yijinjing daoyinshu*.”

“Kio estas tio?”

“*Yijinjing daoyinshu* estas speco de *ĉigong*, kiu povas ŝanĝi la sanstaton de la ekzercanto, longigi lian vivon kaj fortigi lin.

“En la aĝo de 13 jaroj mi disĉipliĝis al Luo Xingwu, majstro de la ĉina *bagua* (ok diagramoj). Mi lernis de li spiritan *bagua*, kiu akcentas ĉefe internan *ĉigong* kaj superon de rigideco per fleksebleco. Mi lernis de li 7 jarojn kaj en 1973 mi disĉipliĝis al Shan Xiangling, majstro de la ĉina manta bokso *Liuhe*. La majstro senrezerve instruis min dum dek jaroj kaj mi posedis la mantan bokson *Liuhe*, fer-manan bokson kaj aglaungan bokson. Kun leviĝo de mia *uŝu*-a nivelo senĉese kreskis ankaŭ mia potenco de *ĉigong*. Lernante de la majstro Luo Xingwu la spiritan *bagua*, mi perceptis la esencon de *ĉigong*. Lernante ĉe la majstro Shan Xiangling mantan bokson *Liuhe*, mi posedis fingran akupunkturadon, masaĝon, *daoyinshu* kaj aliajn specojn de *ĉigong*. Post tio mi lernis ĉe pluraj majstroj de *ĉigong* budhismaj kaj taoismaj. Multe progresis mia lerteco en kuraco per *ĉigong* kaj formiĝis mia propra stilo.”

“Bonvolu konigi, kiel vi kuracas per *ĉigong*.”

“Mia kuracmetodo konsistas el du partoj: *ĉigong*-a akupunkturo kaj fingra akupunkturo. Foje en 1987 venis al mi junulo suferanta de tortikolo. Li nomiĝis Wu Chunhua. Lia nuka vertebro deviis en sportado. Li ne povis turni la kapon, suferis de kapturniĝo, naŭzo, paralizo je la maldekstra flanko kaj muskola atrofio. Li vizitis plurajn famajn hospitalojn en Nankino, Ŝanhajo kaj Tianjin, sed restis neresanigita. Kun lasta espero li venis al mi. Mi pensis,



Xu Shitian

ke lian malsanon kaŭzis perturbo en lia *ĝingluo*-vojo. Mi do akupunkturis per mia fingro sur lian trian nukan vertebrojn per *ĉigong*-terapio. Mi kuracis lin 4-foje, entute dekojn da minutoj, kaj li jam resaniĝis. Iksfotografajo de Tiantan-hospitalo montris, ke lia deviinta vertebro jam residiĝis sur la origina loko.

“Granda parto de miaj pacientoj suferis de doloro je lumbo, gambo kaj artikoj kaj malsanoj de hepato, stomako, koro kaj sangpremo, oftaj sed ne facile kuraceblaj.”

Mi miris pro lia parolado kaj forgesis la horon. Xu Shitian levigis kun pardonpeto: “Antaŭtagmeze mi donos lecionon kaj ne povas paroli plu kun vi.”

Survoje el Yuanmingyuan-gardeno, mi demandis, pri kio li estas okupata. Li diris: “Nun mi instruas al 25 studentoj, la unuaj de *ĉigong*-a fakoj en universitato, taoisman *ĉigong*, ĉin-medicinajn akupunkturaron kaj kaŭterizon kaj ĉinan luktarton *uŝu*. Samtempe mi verkas pri *ĉigong*-ekzercado, *ĉigong*-terapio kaj *uŝu*. Baldaŭ la eldonejo ‘Amikeco’ eldonos tiun libron el 270 mil ideogramoj.” ■


Xu Shitian



Antaŭ kuracado

Xu Shitian kun sia filo eliras por trejnado.

Kuracado per fingra akupunkturo



Pentraĵo de ZHANG LI

Sani estas alia nomo de ji-oj, unu el la ĉinaj nacimalplimultoĵoj. Sani-oj vivas en la provincoj Yunnan, Sichuan (Siĉŭan) kaj Guizhou (Gujōu) kaj en la Guangxi(Gŭangŝji)-a Ĝŭang-nacieca Aŭtonoma Regiono de Ĉinio. Ili okupiĝas ĉefe pri agrikulturo.

La sani-aj viroj portas oblikve malfermitan nigran jaketon kun mallarĝaj manikoj, multfalbalan kaj larĝkruruman pantalonon kaj turbanon el blua ŝtofo kelkajn metrojn longa, dum la virinoj portas bluzon bele borderitan kaj broditan kaj plisitan jupon. La junulinoj ŝatas vuali la kapon per brodita kvadrata tuko kun harplektaĵo sur ĝi.



Ses Feniksaj Ovoj

ANTAŬ tre tre longe estis mallaboremulo, revanta riĉiĝi sen laboro. Iun tagon li iris sur kampo kaj trovis ses gigantajn feniksajn ovojn. Li pensis, ke li baldaŭ riĉiĝos pro la ovoj. Li decidis tributi la ovojn al la reĝo, opiniante, ke la reĝo rekompencos lin per oro.

Sed li estis ordinarulo kaj ne rajtis eniri en la reĝan palacon, li do petis la vilaĝestron transdoni la feniksajn ovojn.

La vilaĝestro pensis: “Kial mi ne restigos por mi unu el ili? La reĝo sola ne bezonas tiom multe.”

Ankaŭ la vilaĝestro ne rajtis iri en la reĝan palacon, kaj li petis la guberniestron transdoni la kvin ovojn.

La guberniestro neniam vidis tiom gigantan ovon. Li pensis same kiel la vilaĝestro, elektis unu el la kvin ovojn kaj transdonis la ceterajn al la provincestro.

Ankaŭ la provincestro restigis por si unu el la ovojn kaj transdonis la ceterajn tri al kortegano.

La edzino de la kortegano informiĝis pri la kuriozaj feniksaj ovojn kaj eliris por rigardi. Ŝi tre ŝatis kaj prenis unu el la tri ovojn. Do, la kortegano havis nur du feniksajn ovojn por transdoni al la ĉefministro.

La fileto de la ĉefministro interesiĝis kaj restigis unu por ludi. Kaj nun la ĉefministro prezentis al la reĝo nur unu feniksajn ovon.

La reĝo ĝoje transprenis el la



mano de la ĉambelano* la gigantan feniksajn ovon. Li laŭdis la lojalecon de la trovinto de la ovo kaj decidis riĉe rekompenci lin.

Li donis al la ĉefministro grandan oran ingoton**, ordonante al li transdoni ĝin al la trovinto de la ovo.

Hejme la ĉefministro anstataŭigis la oran ingoton per argenta kaj transdonis tiun al la kortegano.

Post konsultiĝo kun sia edzino la kortegano anstataŭigis la argentan ingoton per kupra kaj sendis ĝin al la provincestro.

La provincestro ne kredis, ke la kupra ingoto estas rekompenco de la reĝo, sed li ne kuraĝis plendi. Li anstataŭigis la kupran ingoton per fera, pensante, ke la kupra ingoto estas sufiĉe granda por fari el ĝi spegulon.

Poste la provincestro sendis la feran ingoton al la guberniestro.

La guberniestro neniel povis

kredi, ke tiu feraĵo estas la rekompenco de la reĝo. Ĉu la reĝo estus tiel avara? Sed... jes, tiu ĉi fera ingoto almenaŭ sufiĉas por fari el ĝi tranĉilon. Li restigis do la feran ingoton kaj sendis al la vilaĝestro nur rulŝtonon.

La vilaĝestro apenaŭ svenis de kolero vidante, ke la rekompenco de la reĝo estas rulŝtono. Li forĵetis ĝin.

La vilaĝestro venigis la mallaboremulon kaj regalis lin per insultoj: “Vi fripono, kiel vi kuraĝis prezenti al la reĝa moŝto rulŝtonojn kiel feniksajn ovojn? Vi meritas mortpunon.” Je la diro li peze bastonadis la mallaboremulon.

Anstataŭ oron, la mallaboremulo ricevis nur bastonojn. ■

* Ĉambelano: Nobela oficisto, kiu zorgas pri la diversaj servoj en la ĉambro de suvereno.

** Ingoto: Briko el metalo, precipe oro, arĝento aŭ ŝtalo.

LA HODIAŬAJ SHU-VOJOJ (III)

Teksto de WEI LIAO

Fotoj de LIU SIGONG

POST reveno de Xichang al Chengdu, kiam ni veturis per trajno laŭ la Chengdu-Chongqing-a Fervojo orienten, nia humoro estis tre plezura. Ne plu vidigis la sufokaj tuneloj, kiajn ni renkontis sur la Chengdu-Kunming-a Fervojo. Kiam la trajno kuris sur la montetara regiono de sudorienta Sichuan, nia vidkampo tuj larĝiĝis. Tamen, kun la profundigo de la intervjuo laŭ la vojo, ni implikiĝis en ĝojon kaj maltrankvilon.

CHENGDU-CHONGQING-A FERVOJO

La nomita fervojo 505 km longa, finkonstruita kaj malfermita al trafiko en julio 1952, estas la unua fervojo de Sichuan-provinco. Ĝia konstruo plenumiĝis en du jaroj, tamen ĝia historio komenciĝis de ĉ. 1906. Tiam la kamparanoj kontribuis per greno, komercistoj aĉetis akciojn kaj fondiĝis la Sichuan-Hankou-fervoja Kompanio, kiu planis konstrui fervojon de Chengdu al Hankou por malfermi trafikon de Sichuan al aliaj lokoj de la lando.

Post multa peno oni kolektis 20 000 000 taelojn da arĝento, sed la tiama Qing-dinastio subite anoncis en 1911 "statigi" la nekonstruitan fervojon kaj konfiski la privatajn akciojn. La ofenditaj popolanoj leviĝis al kontraŭstaro kaj ĵuris vivi kun la fervojo. Tamen ili estis sange subpremitaj de Qing-dinastio.


Ĝis la fondiĝo de la nova Ĉinio la Chengdu-Chongqing-a Fervojo, por kiu sennombraj herooj oferis sian vivon, fine aperis sur la mapo de la respubliko. Dum la pasintaj pli ol 30 jaroj la fervojo portis al la sudokcidentaj popolanoj feliĉon nekalkuleblan. Abundaj produktoj de la "naturdotita lando" senĉese transportiĝis al diversaj lokoj de la lando. Laŭ la fervojo konstruiĝis miloj da modernaj fabrikoj. La totalaj produktovaloroj de industrio kaj agrikulturo en tiu ĉi regiono okupas gravan pozicion en la provinco. En la lasta jaro la fervojo efektivigis sian elektrizadon, kio altigis la jaran transportan povon de 6 100 000 tunoj al 13 000 000.

Tio ludos netakseblan rolon en akcelado de ekonomia prospero de sudokcidenta Ĉinio.

KVIN-KILOMETRA URBO DE DIZEL-LOKOMOTIVOJ


En Ziyang 100 km fore de Chengdu mi vizitis la kvin-kilometran Ziyang-an Dizel-lokomotivan Fabrikon inter verda monto kaj rivero. Ĝi estas ĉefa bazo en Ĉinio por produkti dizel-lokomotivojn kaj pecojn por dizelaj kaj elektraj lokomotivoj kun granda povo. La fabriko havas pli ol 10 000 laboristojn kaj oficistojn kaj fiksan kapitalon de pli ol 200 000 000 juanoj.

SKEMA MAPO DE SHU-VOJOJ





Sur kajo de Chongqing-stacidomo



De 1980 la fabriko produktis 660 dizel-lokomotivojn, kiuj kuras sur diversaj fervojlinioj tra la tuta lando. En 1988 ĝi produktis 115

manovro-lokomotivojn de Dongfeng 4B kaj Dongfanghong 5. Ĝia totala produktovaloro atingis 170 000 000 juanojn kaj okupas

la duan lokon en la samspecaj fabrikoj de la lando.

Kiam Ĉinio finis produkton de

Ailandaj turistoj en Chongqing





En muntejo de la Ziyang-a Dizel-lokomotiva Fabriko



Aŭtobuso veturanta inter kamparo kaj urbo

vaporlokomotivoj kaj la elektro-
kaj dizellokomotiva produkto ating-
gas novan etapon, la lokomotivo-
urbo faros pli grandan kontribuon.

SUKERA URBO NEIJIANG

Veturinte per trajno ĉ. 90 km de
Ziyang sudorienten, ni atingis la


urbon Neijiang (Nejĝiang).

Ĝi situas ĉe la meza baseno
de Tuojiang(Tuogĝiang)-rivero kaj

Pasaĝerŝipoj sur Yangzi-rivero

Foto de LAI HAILONG





Aperturo de antikva salputo en Zigong

deantikve estas komerca centro. Tie svarmas komercistoj, oportunas diversaj veturiloj. Veturante laŭ la rivero oni povas atingi Chongqing kaj Ŝanhajon kaj la orientan maron.

La urbo estas ne nur trafika centro de la Chengdu-Chongqing-a Fervojo kaj Neijiang-Yibin-a Fervojo, sed ankaŭ fama produktejo de grenaj kaj ekonomiaj plantoj kaj produkta bazo de manĝaĵoj, malpezindustriaĵoj kaj tekstilaĵoj de la provinco. La ŝoseoj kaj fervojoj kiel araneaĵo kunligas la pli ol 70 urbetojn de 8 gubernioj kaj unu distrikton sub la urbo. Tie funkcias proksimume 3 000 entreprenoj grandaj kaj malgrandaj.

La oportuna trafiko kaj avantaĝa medio estas du favoraj kondiĉoj de la urbo Neijiang. Ĝi jam fariĝis urbo de maŝina, kemia, konstrumateriala, karba kaj elektra industrioj, kun manĝaĵa kaj ŝpintekstila industrioj kiel la ĉefaj.

Ĝi estas fama "sukera urbo" kun longa sukerfara historio. Antaŭ 300 jaroj jam prosperis la sukerfaro ambaŭborde de la Tuojiang-rivero.

La Chengdu-Chongqing-a Fervojo kaj sinsekve konstruitaj ŝoseoj

seoj kaj Tuojiang-rivero. La oportuna trafiko kaj raciaj prezoj por sukerkanoj kaj greno levis aktivecon de la sukerkanaj plantistoj. En 1950 la tuta subprovinco produktis nur 20 000 tunojn da sukero, sed en 1957 75 000 tunojn, kiuj konsistigis 73% de la jara totala sukera produktokvanto de la provinco kaj kreis rekordon.

La kansuker-produktado akcelis produktadon de la famaj Neijiang-aj konfitaĵoj kaj sukermangajaĵoj. Neijiang-konfitaĵoj el legomo, fruktoj kaj famaj drogoj, kun 100 varioj de pli ol 60 specoj, estas kolore kaj forme belaj, malsekaj, senfeĉaj kaj bongustaj.

SALA URBO ZIGONG

Kiam Neijiang-anoj kontente gustumas konfitaĵon, najbaraj Zigong-anoj ĉerpas salakvon el putoj 1 000 m. profundaj. En la pasintaj 400 jaroj Zigong reprezentis per sia eminenta putsala tekniko ekonomian kaj kulturen prosperon de la suda parto de Sichuan. Kaj pro tio ĝi akiris nomon "sala urbo".

En 1836 Xinghai-salputo de Zigong atingis profundecon de 1 001 m kaj per tio fariĝis la unua puto de Ĉinio kaj ankaŭ en la mondo

estas favoraj al transportado de sukerkanoj kaj vendado de sukero, kio ŝanĝis la historion de akvovoja transportado de sukerkanoj kaj sukero kaj akcelis la disvolviĝon de la sukera industrio. En la meza periodo de la 50-aj jaroj la sukerkanaj kampoj plejparte dislokiĝis ambaŭflanke de la fervojo, ŝo-

kun profundeco super 1 000 m. La "impulsa putbora tekniko" uzita de Song-dinastio estis enkondukita en Eŭropon en la 11-a jc., kio multe akcelis la disvolviĝon de la monda putbora tekniko.

En la Orienta Han-dinastio antaŭ 1 900 jaroj Zigong jam komencis salfaradon. En la 19-a jc. ĝi fariĝis salfara centro de la sudokcidenta Ĉinio. Tiam tie kolektiĝis centmiloj da salfaristoj kaj proksimume 10 000 teknikistoj. Tie la ekonomio estis vigla kaj prospera.

La putsala farado postulas komplikajn teknologiojn kaj longan produktan tempon, ĝia produktokosto ĝenerale estas 12-oblo de tiu de marsalo. En la historio la putsala produktokvanto de Sichuan iam proksimiĝis al kvinono de la totala sala produktokvanto de la lando. Ĝia putsalo havis tiel mirigan disvolviĝon pro tio, ke la ferma geografia kondiĉo havigis al la produktita putsalo stabilan merkaton. Kun la disvolviĝo de moderna trafiko, mara salo okupis la merkaton de Sichuan, kaj tiel depresiis farado de putsalo.

AKVO TRANSPORTADO EN MALFACILO

Sub premo de la senĉese disvolviĝantaj fervojoj kaj ŝoseoj, ne nur malprosperiĝis la farado de putsalo, sed ankaŭ la transportado de Yangzi-rivero suferis mortan baton.

En Chongqing, ĉe la orienta fino de la Chengdu-Chongqing-a Fervojo, mi vizitis Changjiang-an Ŝipkompanion, la plej grandan ŝipkompanion de Chongqing. Tie mi legis urĝan raporton faritan de kelkaj esploraj institutoj al la centra registaro pri savo de akvo-transportado de Chongqing. La raporto diras: "La akvotransportaj entreprenoj de Chongqing havis postigintan bazon kaj malbonajn eksterajn kondiĉojn kaj nun alfrontas plenan deficiton, la situacio estas tre serioza. Se oni ne alprenos rebonigajn rimedojn, tio

serioze katenos la ekspluatadon de la sudokcidenta ekonomio kaj malhelpos la liveron de krudmaterialoj al industrioj de la malsupra baseno de Yangzi-rivero.”


Iu respondeculo de la kompanio diris al mi: “Ni jam estos kontenta, se la kompanio deficitigos ne tro multe, por ne paroli pri ia ajn disvolvigo. Ni atendas, ke la centra registaro faru decidon por solvi la problemon, kiam akriĝos la kontraŭdiro.”

La Changjiang-a Ŝipkompanio kun pli ol 10 000 laboristoj kaj oficistoj estas la plej granda ŝtata rivera ŝipkompanio de Ĉinio. Ĝi suferis deficiton en sinsekvaj jaroj. Ĝi havis deficiton de 12 600 000 juanoj en 1986, kaj 7 000 000 juanoj en 1988.

Laŭdire, la ĉefa kaŭzo de malfacilo de la akvo-transportado de Chongqing kuŝas en tio, ke en la trafika strategio la ŝtato longtempe alte taksas tertransportadon, sed neglektas akvotransportadon. Ekz., por ordigi la 500-km longan Yangzi-riveran navigvojon en Sichuan, en la pasintaj 38 jaroj ĝi investis nur 137 000 000 juanojn, t.e. 1/26 de la investaĵo por konstrui Xiangfan-Chongqing-an Fervojon. Kaj ankaŭ la interrilatoj de prezoj inter fervoja transportado kaj akvo-transportado estas neraciaj. La var-transporta prezo de la antaŭa estas 17.5 juanoj po unu km. por 1 000 tunoj, sed duobliĝis tiu de la posta. Tio rezultigis la situacion, ke “la fervojoj ne povas plenumi sian taskon, dum la riveraj ŝipoj ne havas sufiĉan taskon”. Krome, la akvo-transporta kosto leviĝis, la entreprenoj dronis en ŝuldo. Rezulte de tio, ju pli multe ili transportas, des pli multe ili deficitigas, kio serioze bridas la aktivecon de la entreprenoj.

Tamen, kiam la ŝipkompanioj sinsekve petas urĝan savon, la Chongqing-a Minsheng-a Ŝipkompanio vidigis al ni esperon.

La kompanio fondiĝis en 1984, tiam ĝi havis nur 2 trenŝipojn kaj



Ŝipoj de la Chongqing-a Minsheng-a Ŝipkompanio veturas inter Kantono kaj Hongkong.

4 remorkojn kun totala transporta povo de 3 000 toneloj. Nun la kompanio havas pli ol 1 000 laboristojn kaj oficistojn, 74 riverŝipojn kaj 6 marŝipojn, kun totala transporta povo de 105 000 toneloj. En 1988 la aliaj ŝipkompanioj havis malsamgradan deficiton, la Minsheng-a Ŝipkompanio enspezis 18 000 000 juanojn kaj profitis 5 000 000 juanojn.

Kiel leviĝis la Minsheng-a Ŝipkompanio en malfavora medio? Unue, ĝi estas private funkciigata. Ĝiaj efikaj administraj rimedoj estas pli facile efektiveblaj ol tiuj de la aliaj ŝtataj entreprenoj. Due, ĝi kuraĝigas la spiriton de Minsheng pene lukti kontraŭ malfaciloj. Ĉiu oficisto kaj laboristo strebas por fari grandan penon en kvalito, rapideco kaj efikeco, sekve de tio la kompanio havas grandan konkurancan povon. Estas alia kaŭzo, ke la transportado de marŝipoj estas multe pli profita ol tiu de riverŝipoj. La profito de la 6 marŝipoj multe superis tiun de la 74 riverŝipoj.

NOVAJ MALFACILOJ SUR SHU-VOJOJ

Multaj ŝipkompanioj afliktiĝas pri la perspektivo, kaj ankaŭ la fervojoj havas sian ĉagrenon.

Wang Yuanfeng, estro de la Chengdu-a Fervoja Buroo, diris al mi: “En la pasintaj dek jaroj, en la tuta Sichuan kaj en la sudokcidenta Ĉinio konstruiĝis neniu fervojo,

sed la jara pasaĝer-transporta kvanto estas 30 000 000 personoj, t.e. sesoble de tiu antaŭ dek jaroj, la jara vartransporta kvanto estas 60 000 000 tunoj, t.e. trioble de tiu antaŭ dek jaroj. Nun almenaŭ 6 000 000 tunoj da varoj atendas transportadon, la fervojoj de la sudokcidenta Ĉinio estas en plena transportado.”

Ankaŭ la pasaĝera transportado estas superŝarĝa. La pasaĝer-transportado de la sudokcidentaj fervojoj ĉiutage estas superŝarĝa, sen diferenco de ĉefsezono kaj depresia sezono. La pasaĝeraj trajnoj estas ĝenerale superŝarĝitaj je 50%.

En la sudokcidenta regiono abundas riveroj, kiuj konsistigas 70% de tiuj de la tuta lando, sed la navigaj riveroj nur 0.3%. Ankaŭ la transporta povo de navigaj riveroj ne estas sufiĉe ekspluatita. Ekz., la jara transporta povo de Yangzi-rivero estas 15 000 000 tunoj, nun nur ĝia triono estas utiligata.

Laŭ raporto, oni nun komencis elektrizan reformadon al la fervojoj Chongqing-Guiyang-a, Guiyang-Kunming-a kaj Guiyang-Changsha-a, kaj plane konstruos la fervojojn Chengdu-Daxian-an kaj Neijiang-Kunming-an. Se tiuj konstruoj plenumiĝos, kredeble mildiĝos la superŝarĝa transportado de la fervojoj en Sichuan.

Tamen oni ankoraŭ ne scias, kiam Yangzi-rivero, kies ora akvo-vojo havas historion de 3 000 jaroj, povos reaperigi sian pasintan prosperon. ■

JINGYANG-MONTEĜO

(El la romano "Ĉe la Akvorando")

de SHI NAI'AN

WU Song iris survoje kelkajn tagojn kaj alvenis al la distrikto de Yanggu-gubernio. Kiam li estis ankoraŭ malproksime de la guberniurbo, iutage en la tagmezo, li eksentis malsaton kaj soifon post irado. Li vidis antaŭ si drinkejon kun vinflago flirtanta antaŭ la pordo. Sur la flago estis skribitaj kvin ideografiaĵoj, kiuj legiĝis: "Post Tri Bovloj Vi Ne Povas Transpasi la Monteĝon."

Wu Song eniris kaj sidigis. Li metis sian klabon kontraŭ la muron kaj ekkriis: "Mastro, tuj donu al mi vinon!" Tiam la drinkejmastro alportis tri bovlojn, paron da manĝbastonetoj kaj teleron da varma legomaĵo, metis ilin antaŭ Wu Song kaj elverŝis por li plenbovlon da vino. Wu Song levis la bovlon, eltrinkis la vinon je unu gluto kaj kriis: "Kiel forta estas la vino! Mastro, se vi havas ion por satigi, mi aĉetu iom por manĝi kun la vino."

La drinkejmastro diris: "Nur kuiritan bovaĵon."

Wu Song diris: "Bone, detranĉu du aŭ tri ĝinojn¹ por manĝi kun la vino."

La drinkejmastro iris en la internan ĉambron, dispecigis du ĝinojn da kuirita bovaĵo, ĝin alportis en plado kaj metis antaŭ Wu Song kaj tuj elverŝis alian bovlon da vino. Eltrinkinte, Wu Song diris: "Bona vino!" Kaj la mastro elverŝis ankoraŭ unu bovlon. Kiam Wu Song estis trinkinta tri bovlojn, la mastro ne plu venis doni vinon. Wu Song frapis la tablon kaj ekkriis: "Mastro, kial vi ne venas doni al mi vinon?"

La mastro respondis: "Sinjoro gasto, se vi volas pli da viando, tion mi alportos al vi."

Wu Song diris: "Mi volas ankaŭ vinon. Distranĉu por mi ankaŭ iom da viando."

La mastro diris: "Viandon mi distranĉos kaj alportos al Sinjoro gasto. Sed pli da vino mi ne donos."

Wu Song diris: "Jen strangaĵo!" Kaj li demandis la mastron: "Kial vi ne volas vendi vinon al

mi?"

La drinkejmastro respondis: "Sinjoro gasto, vidu ke sur la anoncflago ĉe mia pordo estas klare skribite: 'Post Tri Bovloj Vi Ne Povas Transpasi la Monteĝon'."

Wu Song diris: "Kion signifas 'Post Tri Bovloj Vi Ne Povas Transpasi la Monteĝon'?"

La mastro diris: "Nia vino, kvankam vilaĝa, tamen havas la guston kaj forton de malnova vino; kiu ajn gasto veninta al mia gastejo, trinkinte tri bovlojn, ebriiĝas kaj ne povas transpasi la antaŭstarantan monteĝon, jen kial la diro 'Post Tri Bovloj Vi Ne Povas Transpasi la Monteĝon'. Kiam venas preterpasanta gasto, li trinkas nur tri bovlojn kaj ne petas plu."

Wu Song ridis: "Estas tiel! Sed kial mi, trinkinte tri bovlojn, ne ebriiĝis?"

La mastro diris: "Mia vino estas nomata 'Aromo Botelpetra'. Ĝi estas nomata ankaŭ 'Falo Eksterporda'. Kiam ĝi estas enbuŝigita, ĝi gustas tre bone kaj plaĉe, sed post momento ĝi faligas la drinkinton ebria."

Wu Song diris: "Ne babilaĉu! Ĉu mi ne pagos al vi? Verŝu por mi ankoraŭ tri bovlojn!... Wu Song trinkis sume dek kvin bovlojn... Li prenis sian klabon kaj ekiris.

La mastro rapide eliris post li kaj kriis: "Sinjoro gasto, kien vi iras?"

Wu Song haltis kaj demandis: "Kial vi vokas min? Mi ja ne ŝuldas al vi monon por la vino, kial do vi vokas min?"

La mastro kriis: "Mi intencas bonon. Revenu en mian domon kaj vidu kopion de anonco de la magistrato ĉi tie."

Wu Song demandis: "Kia anonco?"

La drinkejmastro respondis: "Lastatempe sur la antaŭstaranta Jingyang-monteĝo sin trovas granda tigro kun elstaraj okuloj kaj blanka frunto, kiu

elvenas nokte por ataki homojn kaj jam mortigis du-tridek fortulojn, tial la magistrato ordonis, ke la ĉasistoj ĝin kaptu antaŭ limdato, alie ili ricevos bastonadon. Ĉe ĉiuj vojkrucoj kondukantaj al la monteĝo estas anoncoj por averti la preterpasantaj vojaĝantojn, ke ili transiru la monteĝon nur en grupoj de la 9-a atm. ĝis la 3-a ptm. Dum la aliaj horoj al neniuj estas permesite transiri la monteĝon. Kaj precipe la unuopaj vojaĝantoj nepre atendu ĝis aliaj venos por ke ili iru kune. Nun jam finiĝas la 3-a horo ptm. kaj mi vidis ke vi ekiris sen informiĝo de aliaj, kio ja signifas senutilan riskon de via vivo. Estas bone, se vi pasigas la nokton ĉi tie ĉe mi kaj atendas ĝis morgaŭ kiam du-tridek homoj estos kolektiĝintaj kaj vi povos kune transpasi la monteĝon.”

Tion aŭdinte Wu Song ekridis kaj diris: “Mi estas homo el Qinghe-gubernio, tiun ĉi Jingyang-monteĝon mi jam transpasis almenaŭ dek aŭ dudek fojojn, sed kiam mi aŭdis ke sin trovas sur ĝi tigro! Ne faru tian fiparolon por timigi min! Eĉ se sin trovas tigro, mi ne timus ĝin.”


La mastro diris: “Mi intencas savi vin. Se vi ne kredas min, envenu kaj vidu la anoncon.”

Wu Song diris: “Fermu vian buŝaĉon! Eĉ se efektive sin trovas tigro, ĉi sinjora moŝto ĝin ne timus! Vi retenas min por loĝi ĉe vi. Ĉu vi intencas atenci mian vivon kaj rabi mian monon en la meznokto, kaj tial vi timigas min per tigracĉo?”

La mastro diris: “Jen vidu! Bona estas mia intenco, sed vi prenas ĝin por malbona intenco kaj tion ĉi mi ricevas kiel dankon! Se vi ne kredas min, do iru laŭ via bontrovo.”

Tiel parolante kaj kapskuante, li revenis en sian gastejon.

Kun sia klabo en mano Wu Song ekmarŝis grandpaŝe al la monteĝo. Kiam li jam iris kvar aŭ kvin liojn², li alvenis al la piedo de la monteĝo kaj tie li vidis grandan arbon. Peco de la arboŝelo estis forskrapita, tiel ke montriĝis tie blanka lig-



“Post tri bovloj vi ne povas transpasi la monteĝon.”

no, sur kiu estis skribitaj du linioj da ideografiaĵoj. Kaj, Wu Song konis ne multe da vortoj. Li levis la kapon kaj legis: “Ĉar lastatempe tigro atakas homojn sur la monteĝo, la preterpasantaj vojaĝantoj povas ĝin transpasi nur en grupoj dum la tempo de la 9-a atm. ĝis la 3-a ptm. Ne endanĝerigu vin mem.”

Leginte Wu Song diris ridante: “Tio ĉi estas artifiko de la drinkejmastro por timigi vojaĝantojn, ke ili iru al lia domo por tranokti. Sed kion malbenitan mi timu!” Kaj trenante la klakon, li supreniris la monteĝon.

Tiam estis malfrua posttagmezo. La ronda ruĝa suno estis malrapide subironta. Stimulite de la vino, Wu Song sentime iris antaŭen sur la monteĝon. Sed li iris malpli ol duonlion, kiam li vidis la kadukiĝintan Templon de Montdio. Alveninte al la fronto de la templo li vidis ke sur la pordo de la templo estas algluita anonco kun oficiala

sigelo. Wu Song haltis kaj legis:

Anonco de Yanggu-gubernio: Ĉar lastatempe aperis sur la monteĝo tigro, kiu mortigis homojn, ĉiuj vilaĝestroj kaj ĉasistoj estas ordonitaj ĝin kapti antaŭ limdato por ne esti punataj per bastonado; tamen ĝi estas ankoraŭ ne kaptita. Se estas vojaĝantoj preterpasantaj, ili povas transpasi kune en grupoj de la 9-a atm. ĝis la 3-a ptm. En la aliaj horoj aŭ en unuopo ili ne transpasu la monteĝon, por ke ili ne risku sian vivon. Ĉiuj atentu la averton.

Leginte la anoncon Wu Song konvinkiĝis, ke efektive sin trovas tigro. Sed kiam li intencis reiri al la drinkejo, li pensis en si: "Se mi reiros, li mokos min kiel malbravulon, tion do mi ne povas fari." Li meditis momenton kaj diris: "Kion malbenindan mi timu! Mi tamen suriru kaj vidu, kio okazos."

Kiam Wu Song estis piediranta, la vinforto komencis tajdi supren, li do puŝis sian feltan ĉapon post la nukon, metis sian klabon sub la brakon kaj supreniris la monteĝon paŝon post paŝo. Li turnis rigardon al la suno kaj vidis ke ĝi estas malrapide subiranta. Tiam estis ĝuste la deka monato; la tagoj estis mallongaj kaj la noktoj longaj, kaj mallumiĝis tre rapide. Wu Song diris al si: "Kie estas tigro! Nur pro timo oni ne kuraĝas supreniri la monton."

Tiel Wu Song iradis iom da tempo kaj la forto de la vino ekŝvelis kaj li eksentis brulan varmegon. Li portis sian klabon en unu mano kaj per la alia li nudigis la bruston. Stumblante kaj ŝanceliĝante li aliris al ĝangalo kaj vidis grandan glatan bluan rokon. Li apogis la klabon ĉe unu flanko kaj kuŝiĝis por dormi. Subite leviĝis forta vento kaj kiam ĝi pasis, li aŭdis muĝegon malantaŭ la ĝangalo kaj de tie elsaltis tigro kun elstaraj okuloj kaj blanka frunto. Ĝin vidinte Wu Song ekkriis: "Ah-jah!" Li sin rulis malsupren de sur la roko, prenis la klabon kaj rapide sin starigis apud la roko.

La tigro estis malsata kaj soifa. Ĝi iom premis siajn antaŭajn piedojn sur la teron, eksaltis supren kaj alflugis tra la aero. Wu Song estis ekstimigita kaj la vino elvenis en malvarma ŝvito. Vidinte la tigron alsaltanta, Wu Song tuj sin ĵetis malantaŭ la beston. Estis malfacile por la tigro vidi homon malantaŭ si kaj tial ĝi premis la antaŭajn piedojn sur la tero kaj ĵet-levis la postan korpoparton por piedbati. Wu Song rapide sin ĵetis flanken kaj tion evitis. La tigro, kiu ne sukcesis ataki lin per ekbato de posta piedo, ekmuĝis kvazaŭ tondrego el la ĉielo tiel, ke eĉ la

monteĝo ekstremis.

La tigro starigis vertikale sian voston tiel rigida kiel fera stango kaj subite ekfrapis per ĝi. Wu Song denove sin ĵetis flanken. La tigro atakas homojn, ja nur per alsalto, piedbato kaj vostfrapo, kaj se tiuj ĉi tri rimedoj fiaskas, duono de ĝia kolera forto jam eluziĝas. Nun kiam la tigro ne trafis la homon per ekfrapo de la vosto, ĝi ree muĝegis kaj sin turnis. Wu Song, vidinte ke la tigro sin turnis, alten levis sian klabon per ambaŭ manoj, kaj per sia tuta forto li faligis ĝin malsupren tra la aero. Aŭdiĝis bruego kaj susure falis rompitaĵoj branĉoj kaj folioj. Kiam li fiksis rigardon, li vidis ke pro hasteco la bato ne trafis la tigron sed velkintan arbon kaj la klabo estis rompita en du partojn kaj li tenis nur ĝian duonon en la mano.

Tiam la tigro eksplodis de kolero kaj muĝegis. Ĝi sin turnis kaj denove alsaltis. Wu Song faris salteton kaj malantaŭeniĝis ĉirkaŭ dek paŝojn, kaj la besto falis ĝuste tiel, ke ĝiaj antaŭaj piedoj surteriĝis antaŭ li. Tiam Wu Song ĵetis flanken la duonan klabon, ambaŭmane kaptis la tigron je ĝia makula verthaŭto kaj ekpemis ĝin malsupren. La besto baraktis por sin liberigi, sed Wu Song per sia tuta forto tenis ĝin firme kaj neniom lasis ĝin moviĝi. Li batadis per ambaŭ piedoj senĉese la vizaĝon kaj la okulojn de la besto. La besto ekmuĝadis kaj faris kavon elskrapinte du amasojn da argilo sub sia korpo. Wu Song enpemis ĝian faŭkon en la kavon.

La forto de la besto elĉerpiĝis pro sia baraktado kontraŭ Wu Song. Li do firme tenis ĝian verthaŭton per la maldekstra mano, liberigis la dekstran manon, kaj tutforte batadis per la martelosimila pugno. Kiam li faris 50-70 batojn, freŝa sango elfluis el la okuloj, buŝo, nazo kaj oreloj de la tigro kaj ĝi tute ne povis moviĝi. Nur el ĝia buŝo ankoraŭ venis spasmospiro. Wu Song liberigis la manon, iris al la pinarboj, trovis la rompitan klabon kaj prenis ĝin. Li timis ke la tigro ne mortos, tial li denove batis ĝin per la klabduono. Nur kiam li vidis, ke eĉ ĝia spirado ĉesis, li formetis la klabon kaj pensis en si: "Mi trenu la mortintan tigron malsupren de la monteĝo."

Sed kiam li venis por levi ĝin el la sangmarĉo, neniel li tion povis! Ĉar lia forto jam elĉerpiĝis kaj liaj manoj kaj piedoj estis malfortaj.

Tradukita de **Pandiŝo**

1. Unu ĝino egalas al duonkilogramo.
2. Unu lio egalas al duonkilometro.

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: unu internacia respondkupon por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp-organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Magdalena Kozlik, 17-j. knabino, dez. kor. tm. pri ĉt. Esperante kaj germane. Adr.: ul. Wigury 18A/19, 63-400 Ostrow Wlkp-urbo, Pollando.

* Lucyna Kupczyk, 17-j. knabino, dez. kor. tm. pri ĉt. Esperante kaj germane. Adr.: ul. Młodziejowa 5/14, 63-400 Ostrow Wlkp-urbo, Pollando.

* Willi Kochling, 37-j. instruisto, dez. kor. tm. pri lernejo-sistemoj, edukado, pedagogio kaj filozofio. Adr.: Fernholte 1, D-5952 Attendorn, FR Germanio.

* Agnieszka Sierocinska, 18-j., volas kor. tm. pri ĉt. Adr.: ul. Krasinskiego 40/11, 41-300 Dabrowa Gornicza, woj. Katowice, Pollando.

* 8 komencantoj, estontaj elektromuntistoj en edukado (17-18-j.) dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: S-ro Ralf Zaziem, Leonhard Frank, Str. 18, Schwerin 2753, GDR.

* Antoaneta Nikolaeva, dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: Razgrad-d, u. Opaka 7840, Bulgario.

* Judit Berta, 17-j. dez. kor. kun gejunuloj de Ĉinio. Adr.: Kecskemet, Kristaly ter 4, 6000 Hungario.

* Kiu konas en Orienta Eŭropo la mezepokan nomon de preĝejo nome UCCZE en latina skribmaniero. Eble sanktulo en tiu kirko estis Huego. Ĉu vi havas afablecon respondi al mi? Gunter Vetstede Septimerstrato 3 A, D 1000 Berlin 51, DDR.

* Kemenes Lorant dez. kor. kun ĉinaj komencantoj france kaj hun-

gare. kolektas pm. Adr.: Str. Horea No 1 Gheorgheni, Cod 4200, Jud. Harghita, Rumanio.

* Andrzej Kopik, 18-j., volas kor. pri ĉinaj luktartoj, historio, filmo, kulturo kaj kutimoj. Adr.: Senatorska 5/1, 08-400 Garwolin, Pollando.

* Dariusz Rozanski, 18-j., volas kor. ĉefe kun ĉinaj knabinoj pri luktarto, kulturo, lingvo kaj filmo de Ĉinio. Adr.: Katowicka 20/10, 41-902 Bytom, Pollando.

* Andrzej Zwawa, 20-j., volas kor. ĉefe kun ĉino kaj japano pri orientfilozofio, internaj luktartoj, tradicia medicino kaj astrologio. Adr.: Bugajska 34, 32-640 Zator, Pollando.

* S-ino Lenke Szasz, 42-j., instruistino, dez. kor. kun tutmondaj gesamideanoj. Adr.: 4174 Praid, Nr. 130, Jud Harghita, Rumanio.

* 'Geonkloj Esperantistoj' aranĝas

korespondadon — gelnantoj kun plenkreskuloj t u t m o n d e .
Skribu: Simcock, Buterton, Leek, Britio, ST13 7SR.

* Mirosława Kociel, 24-j., volas kor. tm., interesiĝas pri turismo, fotografo kaj Esperanto, kolektas bk., turismajn prospektojn, ilustritajn revuojn. Adr.: ul. Lumumby 32 B/7, 80-367 Gdansk, Pollando.

* M a r e k Warmwz volas kor. tm. pri ĉt. Adr.: Os. Bohaterow W r z e s n i a

59/52, 31-621 Krakow, Pollando.

* Eross Adep, 16-j., dez. kor. tm., interesiĝas pri sporto kaj bk. Adr.: Miercurea-Ciuc, Str. Culmei, nr: 11, Sc. B, Ap 9 Etj. 2, Judetul Harghita, Rumanio.

* Klaus-Dieter Scholz, 29-j., dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: PSF 2078, Erfurt, DDR-5060, DDR.

* Stefano Petrovski, 14-j. volas kor. kun ĉinaj geknaboj. Adr.: Bekescsaba, Szolo u. 57, Hungario 5600.

* 20 geesp-istoj (20-40j.) el Palaco de Junularo urbo Leningrado volas kor. kun geesp-istoj en Ĉinio, Japanio, Koreio kaj aliaj landoj kaj en Hongkong, interesiĝas pri turismo, sporto, literaturo, muziko, foto filatelato ktp. Adr.: USSR, 197346 Leningrad, st. Profesoro Popova, 47, Palaco de Junularo, Interklubo Esperantsekcio.

ABONTARIFO DE EPĈ POR 1990

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	15.50	25.5	35.5
Aŭstrio	ATS	210	350	490
Belgio	BEF	600	980	1350
FR Germanio	DEM	32	52	72
Britio	GBP	9	14.5	20
Finnlando	FIM	70	115	160
Francio	FRF	100	160	220
Hispanio	ESP	1500	2400	3400
Italio	ITL	20000	32500	45000
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	35	59	83
Nov-Zelando	NZD	21	35	49
Portugaliao	PTE	1500	2400	3400
Svisio	CHF	26	43	62
Usono	USD	15	25	35
Kanado	CAD	15	24	34

Por aliaj landoj en Eŭropo:

USD 11 18 25

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

USD 7.5 12 17

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

“Sub Cirkotendo”



SUB CIRKOTENDO, originala romano de Stan Bubenič (Dr. Stanislav Bubeniček 1904-1979), eldonita de la Internacia Esperanto-Instituto. Formato: 15 × 21 cm. 195 p. Prezo: 25 gld. Mendebla ĉe la eldonejo laŭ jena adreso: Riouwstraat 172, NL 2585 HW Hago, Nederlando.

Ludemo estas homa naturo kaj al multaj plaĉas cirkaj ludoj. Kiu ne konus la tradiciajn prezentaĵojn de la cirkanoj? Sed kiom da homoj konas la vivon de ili? Kiom da cirkaj artistoj sin okupis per rakontado pri sia vivo? Tiu ĉi romano temas ĝuste pri “sprite rakontitaj travivaĵoj de la aŭtoro dum lia truddeviga deĵoro kiel saksofonisto en vojaĝanta cirk-orkestro.” En ĝi vi ne trovos kortuŝan am-historion aŭ spirithaltigajn aventurojn. Mankas al ĝi ruze aranĝitaj streĉaj intrigoj. Ĝi estas bukedo de koloriĉaj historioj pri la vivo de akrobatoj, ĵonglistoj, dresistoj, muzikistoj, kuiristoj, tendistoj... Jes, sian kontribuon al la popola arto faras ankaŭ la laboristoj, kiuj zorgas pri starigo de la giganta tendo kaj faras tian mirindaĵon, ke “...tie, kie ankoraŭ matene estis nenio krom povra duonflava herbejeto, tagmeze jam rektiĝos al la ĉielo la superba konstruaĵo de la cirka tendo.” Ĝi rakontas al ni, kiel d-ro Georgo Benda, distrikta juĝisto, fariĝis saksofonisto de la cirko, kiel bubo Bohouš Valeko, unu el la ok infanoj de mizera patrino, fariĝis cirka dresisto kaj estis bekpikita kaj piedbatita de struto, kiam li klopodis ĝin kapti je la kolo laŭ mistifika konsilo de sia kolego. Vi legos pri la ĉagreno kaj kolero de ĵonglisto Matessini, kies viglan lu-

don la muzikistoj akompanis per melodio taŭga por elefanto-programero aŭ funebra marŝo. Vin amuzos la rakonto pri la travivaĵo de kuiristo Klouda en Francio, ĉe iu el ĝiaj fervojstacioj li naĝis pro varmego sed ne sukcesis kapti la trajnon, per kiu li devis forveturi kun sia cirko, li en naĝvesto estis embarasita kaj multe mokata de francoj, kies lingvon li ne scipopvis. Ankaŭ sub la cirkotendo la amo ludas sian rolon: trumpetisto enamiĝis al la filino de majstro Obermano (t.e. la supra membro de akrobata triopo), estis rifuzita de la patro en la komenco, kaj poste akceptita de li por daŭrigi lian arton akrobati sur eskalo kaj tiri sin kiel serpento tra la ŝtupetaro. Sed tiu feliĉulo ĉagreniĝis, kiam li trovis, ke li pli kaj pli dikiĝis post la edziĝo.

La cirkanoj devenis de tre diversaj kampoj de la socio. La migranta “templo de popola distraĵo” altiris al si eksjuĝiston, buĉiston, restoraciiston, raziston, ludeman bubon ktp, kiuj sindone klopodas havigi al si necesajn lertecojn por la cirka arto. Ĉe la eniro al la cirka trupo, “lernateston neniu petis de ili, ĉar cirkometion oni ne lernas en lernejo”. La cirko mem ja estas speciala lernejo de tiu popola arto. En la romano vi trovos vivecajn priskribojn pri la aktivadoj antaŭ, dum kaj post la cirka prezentado, pri vojaĝo, pri la movoplenaj stacioj kaj pri la maljuna veterana leono...

Legante la romanon “Sub Cirkotendo”, mi ekpensis pretervole pri la romano “Kredu min, sinjorino!” de Cezaro Rossetti. Ambaŭ romanoj havas karakteron aŭtobiogra-

fian kaj abundecon de sukoplenaj lingvaĵoj. Estas rimarkinde, ke Stan Bubenič kontribudis ankaŭ al la satira gazeto “Dikobraz” (Historiko) de Ĉeĥoslovakio. Rimarkinda kontribuo de “Sub Cirkotendo” estas ĝia “Cirka vortareto” aldonita je la fino, kiu enhavas pli ol cent terminojn pri la cirka aktivado.

Tiu ĉi verko estas ne nur interesa sed ankaŭ instrua legaĵo por la progresantoj pro ĝiaj viveca stilo kaj freŝaj esprimoj. Mi citu nur kelkajn kiel ekzemplojn: ventovipitaj viroj; spiritoforesta rigardo; muelbabili; distribui ridetojn kvaŭzaŭ konservitajn en dolĉacida infuzaĵo; minace ĉirkaŭrigardi por subpremi ĉian dubon tuj en la ĝermo; urbo rimarkinda pro tio, ke tie estas absolute nenio rimarkinda; unu parolas pri pordo, la dua pri mordo kaj la tria pri lordo; per grandaj glutoj trinki el la pokalo de liberiga ebrieco... Mi kredas, ke al multaj plaĉos la stila aromo de la aŭtoro.

Per kritikemaj okuloj eble oni rimarkos kelkajn plumerarojn, kiel ekzemple: “turnigis telerojn” (p. 87 anstataŭ “turnis telerojn”) kaj “forveturis ĝian kompanon” (p. 126 anstataŭ “forveturigis ĝian kompanon”). Kaj krome, al kelkaj neologismoj netroveblaj eĉ en PIV mankas necesaj klarigoj, kiel. ekz. inhibitoro, helero kaj basisto. Tamen tiaj makuletoj ja ne povas malfortigi la brilon de la lingvo de la verko. Kredu min, gesinjoroj, ke tiu ĉi romano vin regalos per same multe da ĝuo kaj instruo, kiel la populara “Kredu min, sinjorino!”

Recenzis Li Shijun

Vizito al la Unua Konsultiĝa Institucio pri Psiko de Pekino

de CHEN BAOHE

LASTAJARE mi jam informiĝis, ke en Pekino fondiĝis unua psikokonsulta kaj psikoterapia institucio—la Psikokonduta Sandirekta Centro. Iun tagon en la fino de junio de la kuranta jaro, mi vizitis la centron, kiu estas nova afero por plejparto de la ĉinoj.

Ĝi sidas ĉe la movoplena kruciĝejo Xidan, fronta al strato kun okulfrapa nomtabulo apud la pordego, tial ĝi facile altiras atenton de preterpaŝantoj.

Ĝiaj respondeculo Zhang Cheng kaj juna kuracisto Chu Chengping varme akceptis min kaj konigis al mi ĝian naskiĝon.

LA UNUA CENTRO EN ĈINIO

Zhang Cheng diris: “Unue mi diras, kial ni uzas tiun atentovekan nomon. La kaŭzoj kuŝas en tio, ke unue, en Pekino kaj eĉ en la tuta lando nia centro estas la unua institucio pri psika konsultiĝo kaj psikoterapio; due, tia servo estas tute fremda por la ĉinoj, tial ni esperas, ke ĝia okulfrapa nomo povos vekti pli multe da atento en la socio.”

Tiu mezaĝa respondeculo daŭrigis, ke pro la longtempa fermiteco de Ĉinio, psikologio neniam ricevis meritan disvolvon. En praktiko de la reforma kaj pord-

malferma politiko en Ĉinio, prudentaj psikologoj de Pekino klopodis disvolvi psikologion kaj fondi koncernan institucion servi rekte al la publiko. En 1985, la psikologia fakultato de la Pekina Universitato funkciigis du-jaran psikologian kurson, en kiu studis nombro da profesiaj kuracistoj. Tio ludis gravan akcelan rolon en disvolvo de konsultiĝo pri psiko kaj psikoterapio en Pekino. Aprile de la lasta jaro, dank’ al la rekta klopodo de psikologia profesoro Zhang Boyuan, konduto-medicinisto Dong Jingwu (Dong Ĝing’u) kaj s-ino Xu Xiuru (Ŝju Ŝiŭju), esploranta kriman psikon de gejunuloj kaj geknaboj, la Ĉina Saneduka Instituto kaj la Eduka Institucio de la Okcidenta Distrikto de Pekino kune fondis la Psikonkondutan Sandirektan Centron.

ĈU ĈINIO BEZONAS PSIKO-KURACISTOJN?

“Ĉu Ĉinio vere bezonas kiel la okcidentaj landoj psikokuracistojn kaj devas disvolvi psikologion?” mi prezentis la ĝeneralan demandon. Laŭ mia kono, kvankam la psikokuracistoj kaj psikomedicino estas novaj por plejparto de la ĉinoj, tamen leviĝis tute antagonismaj opinioj en la socio post la fondiĝo de la centro.

“Permesu al mi diri la opinion,” d-ro Chu daŭrigis la parolon. 27-jara kuracisto Chu antaŭe

estis ostokuracisto de iu hospitalo. En 1985 li studis en la psikologia kurso de la Pekina Universitato kaj ricevis trejnadon pri psika konsultiĝo kaj psikoterapio. Post la fondiĝo de la centro, li tie laboris kiel psikokuracisto de la unua generacio en Ĉinio.

Unue li rakontis pri malsanulino traktita de li mem. Ŝi estis mezaĝa virino de Pekino kaj ripozis en sia hejmo post granda operacio. Post ĉ. duonjaro, ŝi iom post iom resaniĝis, tamen falis en alian malfeliĉon. Ĉar ŝi sola travivis plejparton de la tempo en la duonjaro, ŝi suferis seriozan psikan perturbon kaj estis turmentita de mensa depresio.

En la komenco ŝi ĉiutage maltrankviliĝis, ke ŝia edzo suferos de trafika akcidento dum irado al laboro kaj hejmeveno, kaj ke ŝia patrino en alia loko estos prirabita. Ŝi ploris, terurigiĝis kaj eĉ histeriigiĝis senkaŭze. Pro la psikoza turmentado, ŝi plurfoje intencis sin mortigi.

Poste, ŝia amikino proponis, ke ŝi petu helpon de la Psikokonduta Sandirekta Centro. Komence ŝi ne akceptis la proponon. Post nelonge, ŝi retrovis sian kuraĝon. Ekster ŝia atendo, dank’ al la helpo de la psikokuracisto, ŝi liberigis sin el la ekstravagancaj senbazaj pensoj post unu monaĝo.

D-ro Chu diris: “Ne nur serioze



S-ro Zhang Cheng respondas al mezlernejaninoj.

psikozaj pacientoj bezonas kuraccon, sed ankaŭ la suferantoj de ordinara psika perturbo bezonas helpon de aliaj, precipe de psikokuracistoj, ĉar plejparto de la psikozo-suferantoj ne volas rakonti sian enkoran aflikton al aliaj por eviti malŝaton kaj mokon. Se ili ne ricevas ĝustatempan efikan kuracadon kaj helpon, ilia malsano eble malboniĝos. Tio portos pli grandan malutilon al la pacientoj, iliaj familianoj kaj la socio.”

JUNULOJ KAJ KNABOJ BEZONAS PLI DA HELPO

Zhang Cheng diris, ke en la pasinta pli ol unu jaro, ili faris 5 000 psike konsultiĝajn kaj psikoterapiajn servojn kaj psikan ekzamenon al pli ol 15 000 homoj, interalie 76% estis junuloj kaj knaboj.

Zhang Cheng opiniis, ke en tia fenomeno estas du ĉefaj kaŭzoj: Unue, la junuloj kaj knaboj estas en kreska periodo, estas ne tre forta ilia psiko por rezisti kontraŭ premforto. Kiam la ekstera premforto estas tro granda, al ili facile okazas psika perturbo. Due, junu-

loj kaj knaboj pli volas akcepti novajn aferojn kaj malkaŝi sian koron al aliaj. Ĝuste pro tio, tiel multaj junuloj kaj knaboj sin turnis al la centro por peti kuracadon.

Tiu respondeculo aparte emfazis, ke gepatroj ne devas doni simplan edukon al sia infano. La klinika praktikado montris, ke psika malsano de multaj pacientoj efektive rezultis el ilia travivaĵo en la knabeco. Li eldiris ekzemplon: Iu 34-35-jara junulo multjare ne povis sin liberigi de rememoro pri la pasintaj malagrablaj travivaĵoj ĝis tia grado, ke li eĉ ne povis persisti en normala laboro. La psikokuracisto trovis, ke la malsano jam suferigis lin, kiam li estis 10-jara, ĉar li neniam forgesis, ke li estis solide batita de sia patro en lia 5-jara aĝo.

Kompreneble, la respondeculo opiniis, ke la nunaj gepatroj de Ĉinio devas atente bridi sian drolon al la infano. Li rakontis, ke iu 25-jara junulo en akompano de la patro venis al la centro por peti psikan ekzamenon. Tiu junulo ne sciis kiel respondi ĉiun demandon en la tabelo kaj volis demandi sian

patron. Post interparolado kun lia patro, ni informiĝis, ke kiam la junulo estis en kreskado, ĉiuj liaj aferoj fareblaj per aliaj certe estis faritaj de ili.

Pro tio, Zhang Cheng opiniis, ke gepatroj, instruistoj de lernejoj kaj eĉ gvidantoj de ĉiuj fabrikoj, minejoj kaj entreprenoj ĉiuj devas posedi certajn psikologiajn sciojn. Tio multe helpas ilin en solvado de la renkontitaj problemoj.

DISVOLVIĜO EN MALFACILOJ

En interparolado mi informiĝis, ke la Psikokonduta Sandirekta Centro havas nur kvar profesiajn laborantojn kaj 7-8 kumulajn. Ĝia enspezo eĉ ne povas kovri la elspezon, tiel ke ĝi bezonas financan subtenon de la loka registaro.

Malgraŭ tio, la centro grandigas sian servon kaj vastiĝas ankaŭ ĝia influo.

Zhang Cheng konigis al mi, ke ilia psike konsultiĝa kaj psikoterapia servo ampleksas dekojn da psikaj malsanoj kaj samtempe proponas servon de 16 psikaj ekzamenoj. 30% el iliaj pacientoj venis de ĉ. 10 provincoj kaj aŭtonomaj regionoj, kiaj Sichuan, Shanxi (Ŝanŝji), Liaoning (Ljaŭning), Hebei, la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio.

Pri la perspektivo de psikokuracistoj en Ĉinio, d-ro Chu optimisme diris, ke en la komenco de ilia laboro, la vizitantoj eĉ ne konis kion ili faras. Iuj misopiniis, ke ili estas sorto-divenistoj. Sed la alvenintoj nun scias, ke ili alvenis por peti kuracadon. Tiu ĉi juna psikokuracisto diris al mi en mia vizitofino: “Jam en la komenco mi kaj miaj kolegoj konis, ke ni iras sur malfacila vojo. Sed ni kredas, ke nia afero estas bezonata de la ĉina publiko, tial ĝi certe havos vastan perspektivon.” ■

Xianggong-montaro kaj Dadu-rivero


Teksto de XU YE kaj WANG QINGHUA

Fotoj de XU JINYAN

SUDE de Ya'an, la Suda Silka Vojo transiras la Grandan Xianggong(Ŝjanggong)-montaron kaj torentan Dadu-riveron. Apikaĵo sekvas apikaĵon kaj ŝnurpontoj pendas super la rivero. Kia danĝera loko!

FAJENCA POTO DE YINGJING

Yingjing (Jingĝing), antikva urbeto, antaŭe estis poŝtstacio sur la vojo. Historio diras, ke en 223 a.-K. Qin(Ĉin)-regno pereigis Chu-regnon kaj postenigis Yandao, membron de la familio de la reĝo de Chu-regno, kiel estron de la loko, kiu nomiĝis Yandao-gubernio. De tiam la antaŭa dezerta loko estis strategie grava. Yandao-gubernio kovris multe pli





Monumento sur ruino de Yandao-urbeto

vastan areon ol la nuna Yingjing-gubernio. Hodiaŭ, proksime de la ŝoseo sude de la urbeto, staras ste-

leo, kiu markas la ruinon de la antaŭa Yandao-urbeto. La kampo kaj herboza murruino vidigas ĝian antaŭan amplekson kaj la dikecon de urbomuroj.

Tiu urbeto malaperis kun tempo-paso. Sed la arto fari fajencan poton daŭris tra la pasintaj du jarmiloj. La fajenca poto estas farita el miksaĵo de argilo kaj karbopulvoro. Ĝi aspektas nigre brila. Tie ambaŭflanke de aŭtovojo etkomercistoj ofertas stakojn da potoj kaj aliaj fajencaĵoj. Multaj tieaj vilaĝoj produktas tiajn potojn. En produktejo ni vidis, ke majstroj piede turnas radojn, knedas argilon kaj elfaras bakotajn potojn unu post alia; apud la bakujo majstroj, kun varmŝirma pajloĉapelo sur la kapo, per longa stango elprenis el ĝi ruĝe ardajn potojn. Laŭdire, antaŭe ĉirkaŭ la urbeto kuŝis montetoj el bonkvalita argilo. Nun tiuj montetoj jam foriĝis pro argilo-





Produktejo de fajencaj potoj



Ŝtala ponto super Dadu-rivero


preno.

Vilaganoj grandkvante produktas ankaŭ tamburformajn potojn, kuirpotojn, florpotojn, te-kruĉojn k.a., krom ordinaraj fajencaj potoj, vazoj kaj fornoj, entute 40 specojn. Maljuna potovendistino diris al ni, ke viando kaj legomo kuiritaj en tia poto gustas freŝe, kaj la plej apetitoveka estas tiel kuirita toŭfu kun kapo de Ya'an-fiŝo.

LA GRANDA XIANGGONG-MONTARO

Trairinte la urbeton, ĉu laŭ antikva vojo, ĉu laŭ hodiaŭa aŭtovojo, oni nepre devas transiri la Grandan Xianggong-montaron.

Antikve la montaro nomigis Qiongzuo(Ĉjongzŭo)-montaro kaj estis limmonto de han-oj kaj ji-oj.



Sur antikva vojo al Henan-poŝtstacio



Naciminoritataj virinoj en Sichuan

Legendo diras, ke iam inter 220-265, Zhuge Liang (Ĝuge Ljang), la ĉefministro de Shu-

regno, en ekspedicio suden transiris la montaron, tial ĝi ricevis la nomon Xianggong-montaro

(Xianggong en la ĉina lingvo signifas ĉefministron). La 200-km-longa montaro kun 40 pintoj altaj



La Vento-pluva Ponto en Qingxi



Kampoj ĉe la piedo de la Granda Xianggong-montaro

je pli ol 3 000 m. kuŝas inter Qingyi(Ĉingji)- kaj Dadu-riveroj kaj apartigas Chengdu-ebenaĵon disde Xichang(Ŝjiĉang)-valo.

La nordon de la montaro kovras arboj, arbedoj kaj bambuoj. Nia aŭto supreniris laŭ zigzaga vojo, kvazaŭ en natura arbara parko. Ĉe vesperigo ni atingis Nibayakou, kie ni elaŭtigis. Sude de ni pintoj kaj valoj interplektiĝas, la montodeklivoj plenas je ŝtonetoj, kaj grizaj nuboj ŝirmas la pintojn.

Kampano en la montaro diris al ni, ke la suda deklivo estas malvarma kaj malfekunda, kie povas kreski nur maizo kaj terpomoj. La plej multe plantita, laŭ li, estas zantoksilo (*Zanthoxylum bungeanum*). Ĝia frukto estas ruĝa kaj pike aroma. Antaŭe ĝi servis kiel tributo al kortego, kaj nun ĝi riĉigas la lokanojn. Iuj familioj kulturas po pli ol 20 000 zantoksilojn, ĉiu arbedo donas 5 kg. da fruktoj jare.

De tie ni iris malsupren. Sur la teraso meze de la montodeklivo troviĝas la antikva urbeto Qingxi (Ĉingŝji). En la pasinteco karavanoj, ĉu suprenirantaj, ĉu malsuprenirantaj, ripozis tie. Kun tempo-paso la urbeto fariĝis komercejo, kiu tamen malprosperigis en Qing-dinastio (1616-1911).

Ni iris sur la urboturon kaj vi-

dis, ke ĉie regas printempo: verdaj ĉerizoj, ruĝetaj pomfloroj kaj flavaj floroj de olerapoj, kaj eĉ sur la supro de urbomuro ŝosas maizo. En la urbeto malaperis la Ventopluva Turo. La ŝtonplata vojo estas cemento pavimita. Akvokrano vidigis ĉe la pordo de ĉiu domo. Televidil-antenoj etendiĝas sur tegmentoj. Irante tra la urbeto, oni ege miras pro ĝia nova aspekto. Sur ĉiu kortopordo estas ruĝa versparo bele skribita. Ĝi aldonas al la urbeto festan etoson.

DADU-RIVERO

Ĉe la piedo de la Granda Xianggong-montaro torentas Dadu-rivero.

La 1 155-km-longa rivero fontas el Guoluo-monto, oriente de Bayan-Har-montaro, kaj enfluas en Minjiang-riveron ĉe Leshan-gubernio. Ĝi impetas, kiel ies verso priskribas: "Torenta ondo ĵetas ŝipon pli rapide ol la arko sagon."

En 1863, Shi Dakai, komandanto de la ekspedicio de la Taiping-a Ĉiela Regno, kun siaj 30 000 soldatoj intencis transiri Dadu-riveron. Antaŭ la furioza fluego li paliĝis en malespero kaj kun larmoj en la okuloj. Oni diras, ke 10 000 soldatoj kaj iliaj familianoj

en la sieĝo de la armeo de Qing-registaro preferis morton al subiĝo. Ili en blankaj vestoj kaj kiraso sin ĵetis en la riveron.

La natura abismo tamen ne baras homan iradon. Antikvaj ji-oj ĉe la rivero inventis ŝnurponton por venki la abismon. Frua tia ponto estis farita el bambustangetoj. Oni fiksis ĝiajn finojn ĉe ambaŭ bordoj de la rivero. Homoj aŭ bestoj helpe de sia gravito kaj bambua tubo glitis laŭ la ŝnurponto trans la valon. Kiel fiksi finon al la transa bordo? Unu el la rimedoj estas, ke oni ligas ŝnurfinon al sago kaj pafas la sagon al la transa bordo, kaj la alia estas, ke oni metas ŝnuron en la riveron ĉe kurbigo kaj lasas ĝin flosi al la transa bordo.

La ŝnurponto estas miraklo de la antikva pontokonstruado. Nun ĝi restas grava trafikilo por lokanoj, tamen, ĝenerale, oni anstataŭigas bambuŝnuron per ŝtalkingo. Ĝia principo estas vaste aplikata en konstruado de modernaj pontoj. La ŝtala ponto super Dadu-rivero servas kiel bona ekzemplo. Ĝia spano longas je 208.3 m. kaj estas la plej granda el tiuj de la samspecaj pontoj en Ĉinio.

Transpasinte Dadu-riveron, la silka vojo iras supren al la sola pinto de Longtang-montaro. Sur ĝia spino estas Sutro-sunumejo. Laŭ popola diro, bonzo de la sepa jarcento Xuan Zang (Ŝjŭan Zang) revenante de la Okcidento sunumis sutrojn sur apudvoja rokego. Pro tio sur la rokego restis densaj sutroskriboj. Vilaĝestro kondukis nin al la dek-kvadratmetra rokego, sed tre bedaŭrinde, kun tempopaso, la sutroskriboj fariĝis nerekoncibleblaj.

De la sunumejo la vojo etendiĝas suden al Henan-poŝtstacio. Tiu parto da ŝtonplata vojo, brile glata pro longtempa tretado far homoj kaj brutoj, reflektas ruĝon, bluan, blankon kaj aliajn kolorojn. Ambaŭflanke de ĝi pompe floras aleŭritoj. Oni sentas sin kvazaŭ en florpado. Tiu vojo estas nepre irata de tieaj tibet-nacianoj kaj ji-oj por foiro. Ĝi estas ankaŭ la ununura elirejo por karavanoj kun montaj produktaĵoj kaj karbo. ■

La Pitoreskejo Hailuogou

Teksto kaj fotoj de LU YUANCHAO

LA pitoreskejo Hailuogou (Hajlūogou) lastatempe malfermita de Ĉinio situas en Sichuan-provinco en okcidenta Ĉinio kaj estas 2 850-6 750 metrojn alta super la marnivelo. Tie ne nur kreskas densa primitiva arbaro, sed ankaŭ kuŝas granda nuntempa glaci-rivero en kompare malalta situo, la pejzaĝoj estas grandiozaj kaj kuriozaj.

Pli ol 20 kilometrojn for de Hailuogou sidas urbeto, kiu estas la fino de ŝoseo. Irinte pli okcidenten, oni eniras en la pitoreskejon.

Hailuogou estas glacieroza rivervalo de la orienta deklivo de Gongga-monto, kun longeco de 30.7 kilometroj kaj alteco de pli ol 3 000 metroj, tial oni dekomence devas grimpi monton por viziti la pitoreskejon. Ĝiaj pejzaĝoj varias en malsamaj altecoj. Enirinte la valon, oni povas vidi ĉiamverdajn foliarbojn, kreskantajn sur la ambaŭflankaj montoj, nelonge post plua grimrado oni eniras la primitivan arbaron, kie vidiĝas foli-kaj pinglarboj, fine nur pinglarboj. Tiuj arboj estas altaj, rektaj kaj ombraj. La grandaj arboj estas dikaj je du aŭ tri ĉirkaŭprenoj. Preskaŭ sur ĉiu arbo parazitadas verdaj lianecaj vegetaloj kaj sub la arboj dense kreskas arbedoj. Surttere sterniĝas dika tavolo da putriĝintaj folioj. En la arbaro ofte videblas falintaj gigantaj pinoj, sur kiuj kreskas arbetoj. En la arbaro la aero estas humida kaj la tero ĉiam estas malseka kvazaŭ post pluvado. Fakte, sen pluvado ankaŭ oni povas aŭdi pluvan gutadon. Nebulo mistere ŝvebas ofte en la arbaro. En densa nebulo oni

malfacile distingas la direkton.

La primitiva arbaro etendiĝas supren laŭ la montodeklivo de Hailuogou kaj fine estas anstataŭita de rokoj, glacio kaj neĝo. Antaŭ malapero de la arbaro, oni povas vidi la glaciriveron, kiu etendiĝas en la arbaron 6 kilometrojn. Estas malofta la fenomeno, ke kune ekzistas arbaro kaj glacirivero. Starante sur montosupro flanke de la glacirivero oni povas vidi, ke la giganta glacirivero serpentumas supren ĝis la ĉielo. Kiel grandioza! La glacirivero Hailuogou longas 14.7 kilometrojn, larĝas 0.4-0.7 kilometron kaj dikas ĉ. 100-130 metrojn. Ĝi konsistas el tri ŝtupoj. La unua ŝtupo situas super 4 800 metrojn super la marnivelo, la loko kovrita de neĝo estas naskiĝloko de la glacirivero. Pro ĝia tro alta situo vizitantoj ĝenerale ne povas ĝin atingi. La meza ŝtupo estas granda glacifalo, ĉ. 4 800-3 720 metrojn super la marnivelo. La glacifalo larĝas je 500-1 100 metroj, kvazaŭ akvo falus malsupren. Ĝia amasigita glacio kaj neĝo aspektas kvieti, fakte ĉiam ajn povus okazi grandskala disfalo. La granda bruoj en disfalo estas tre timiga. La lasta ŝtupo estas glacirivera lango, kiu etendiĝas profunden en la arbaron. Pro la mova kaj degela efiko, sur la surfaco de la glacia lango dislokiĝas multaj timigaj fendegoj kun nemezurebla profundo. Ĵetinte ŝtonon en fendon, oni povas aŭdi longan resonon. Krom danĝeraj fendoj, tie ekzistas ankaŭ interesaj pejzaĝoj: multkoloraj vivoveraj serakoj, glaciaj fungoj, surglaciaj riveroj, pontoj kaj kavernoj kiel palacoj sub glacio. Vere kristala mondo!

Estas ne tre malfacile viziti la glaciriveron Hailuogou pro ĝia malfacileco. En varma somero, oni eĉ povas libere viziti en ĉemizo la glaciriveron. Sed por tranokti en la loko oni devas havi sufiĉan kuraĝon. Nokto en Hailuogou estas tre malluma kaj kvieti. Hazarde aŭdiĝas muĝo de sovaĝaj bestoj, tio sentigas al la tranoktintoj barbaran kaj primitivan atmosferon. Oni diras, ke tie vivas animaloj de centoj da specioj, kiaj bovantiloj, sovaĝaj azenoj, makakoj, pandoj k.a. Paŝante tage en la arbaro, oni povas aŭdi branĉo-rompajn sonojn faritajn de bestoj. Sekvante laŭ la sonoj, oni povas vidi arbobranĉojn moviĝantaj. Multaj lokaj drogherbo-kolektantoj diris, ke ili vidis aron da bovantiloj trinkantaj ĉe termofonto en la arbaro. Ili nomas tiujn bestojn sovaĝaj bovoj.

Ĉe tagiĝo, palpebrumas steloj sur la malhele blua ĉielo, malklare vidiĝas la glacirivero kaj la ĉirkaŭaj neĝkovritaj montpintoj. En la sunlumo, la ŝanĝiĝema naturo tiam fariĝas simpla granda kolorbloko. La ĉielo iom post iom heliĝas kaj la granda kolorbloko malrapide reprenis sian antaŭan aspekton. Ĉe tiu momento, hela ruĝeto aperas super malproksima neĝmontpinto. La koloro rapide vastiĝas kaj iom post iom fariĝas oranĝflava, finfine la tuta montpinto fariĝas orbrila. Tiam la glacirivero ankoraŭ estas en senluma nebulo kaj vidiĝas en blua purpuro. La pejzaĝo kvazaŭ estas arda magmo ŝprucanta el la tero kaj dissendanta brilajn orradiojn en buntaj nuboj. ■



Neĝpintoj en mateno

Primitiva arbaro





Glaci-falo

En valo



Korposanigaj metodoj (IX)

Protokto de la nerva kaj mova sistemoj

LETARGIO

1. Sidu kun la genuoj fleksitaj kaj piedoj etenditaj. Etendu la maldekstran manon preter la dekstra poplita kavo, metu ĝin sur la maldekstran instepon kaj per ĝi kaptu la fingrojn de la maldekstra piedo. Etendu la dekstran manon preter la maldekstra poplita kavo, metu ĝin sur la dekstran instepon kaj per ĝi kaptu la fingrojn de la dekstra piedo (Bildo 1). Per ambaŭ manoj forte tiru la piedfingrojn 2 fojojn samtempe. Ripetada ekzercado per tiu metodo povas kuraci letargion kaj mensan deprimon.

2. Tenu la mentonon per unu mano, forte puŝu ĝin supren kaj etendu la alian manon malantaŭ la dorson. Rapide turnu la manojn kaj montru la polmojn en ĉiuj direktoj. Tion faru laŭeble 28 fojojn, alter-nante la manojn. Poste, tenu la mentonon per la manoj kaj forte turnu la kapon kaj korpon dekstren kaj maldekstren je 14 fojoj. Tio estas utila por forigi letargion kaj malsanojn de ŝultro, brako kaj kapo kaŭzitaĵn de patogena vento.

KORAJ KAJ BRUSTAJ MALSANOJ

1. La kormalsanulo ofte sentas malvarmon aŭ varmon. Se li sentas malvarmon, li do malrapide elspiro

per la buŝo post profunda enspiro. Se li sentas varmon, li do malrapide elblovu per la buŝo la aeron post profunda enspiro.

2. Staru sur la genuoj sur planko. Etendu la manojn antaŭen kaj premu per ili la plankon. Turnu la talion kaj dorson. Kiam vi estas tute malstreĉita, plenforte rektigu la talion, kaj post tio klinu vin malantaŭen kun la okuloj supren kaj genuiĝu (Bildo 2). Tiam vi tuj sentas, kvazaŭ malvarma aero eliĝus el la dorso. Tio dolorigas la ŝultrojn kaj brakojn. Sidiĝu, kiam vi sentas sufokiĝon. Tion ripetu 14 fojojn. La ekzercado povas kuraci la misfunkcion de la internaj organoj, dorsan doloron kaj brustan sufokiĝon.

MALSANOJ DE NUKO KAJ DORSO

1. Tenu la mankavojn supren kaj turnu ilin malantaŭen. Kiel eble plej forte levu la ŝultrojn antaŭen. Premu la brakojn tuj al la aksejoj kaj forte skuu ilin antaŭen. Ripetu tion 21 fojojn. Tion farinte, kiel eble plej forte levu la fleksitajn kubutojn, balancu ilin supren kaj malsupren je 14 fojoj. Pugnigu la manojn 7 fojojn. Tio povas forigi la perturbon de la ŝultroj kaj nuko. Pugnigu la dekstran manon, fleksu la kubuton maldekstren kaj la alian

manon. Per ĝi tenu la dekstran kubuton (Bildo 3) kaj tiru ĝin maldekstren. Laŭeble oblikve tiru ĝin supren kaj malsupren por kelka tempo. Malstreĉu la pugnigitan manon, elvolvu la fingrojn 3 fojojn kaj post tio faru la samon per la alia mano. Ripetu tion 28 fojojn. La ekzercado povas kuraci la perturbon de la ŝultroj kaj kubutoj. Denove fleksu la kubutojn, forte levu ambaŭ manojn supren, ĝis la kubutoj rektiĝos. Faru tion 21 sinsekvajn fojojn. Post tio, per la manoj tenu la nukon (Bildo 4) senmova kaj levu supren la kubutojn. Tion faru laŭeble 7 fojojn. Fine, tenu la nukon senmova per la manoj, kubutoj kaj brakoj. Laŭeble turnu la supran parton de la korpo malantaŭen. Turnu vin dekstren kaj maldekstren je 21 fojoj. Tio povas forigi malvarman aeron el la nukaj vertebroj.

2. Sidu kun krucitaj kruroj rektigitaj. Per la manoj tenu la fingrojn de la piedoj (Bildo 5). Retenu la spiradon post enspiro kaj levu ambaŭ piedojn supren. Kiam vi ne povas plu reteni la spiradon, klinu la kapon, elspiro kaj malstreĉu la piedojn. Faru tion 9 sinsekvajn fojojn. Tio povas forigi doloron de la kolo, dorso, talio kaj piedoj kaj kuraci malsanon kaŭzitan de trolaciĝo kaj trostreĉiĝo.

(Daŭrigota)



1



2



3



4



5

En granda urbo

Teksto de YAN JIN

Fotoj de ZHANG GUOWEI

Ŝanhajo estas granda urbo de Ĉinio, kun 10 milionoj da loĝantoj. Ĉiutage en ĝi okazas multaj ŝanĝiĝoj. La loĝantoj havas malsamajn pensojn, aspirojn kaj sentojn, kiuj formas bildon de vivo. Jen kelkaj fotoj pri vidaĵoj en ĝi.

Edzo antaŭ obstetrika hospitalo



Por sanigi la korpon








Helpo al nekonato



Forgesita filo



Patro kaj filo



Kolportisto el antaŭurbo



"S-ro policano, mi ne estas kulpa."

En pluvo



Nova Terapio pri Brulvundo

— Vizito al Xu Rongxiang, fakulo de brulvundo

de DA WEI

EN moderna kabineto mi vizitis sinjoron Xu Rongxiang (Sju Jongŝjang), kiu faris sensacion en la medicinistaj rondoj ĉina kaj internacia per sia senŝirma humida brulvunda terapio.

Li, 31-jara, estas altstatura kaj korpulenta, kun okulvitroj sur la nazo, kaj elspiras studentan temperamenton.

Por ke mi konu lian penson, li projekciis por mi videobendon pri senŝirma humida brulvunda terapio. Kun la bildoj nia interparolo ŝanĝiĝis senĉese.

Brulvundo estas tre dolora kaj minacanta la homan sanon kaj vivon. Ĝia morbokvanto estas granda. Antaŭ la fino de la 30-aj jaroj de la 20-a jarcento paciento, kies brulvundo kovris pli ol 30% de ties korpo, estis malfacile savebla. En la komenco de la 40-aj jaroj traŭmatologoj aplikis traŭmatan kirurgion al kuracado de brulvunditoj, nur tiam

aperis nova fenomeno kaj naskiĝis kuracaj teknikoj por fortranĉi krustojn kaj grefti haŭton. Poste, oni trovis, ke humida vundo facile kaŭzas bakterian infekton, sekve de tio aperis sistema terapio de krusta sekigo. Ĝi iom post iom formis relative unuecan sekan medicinan sistemon por kuraci brulvundon en diversaj landoj.

“Tia terapio povas nur savi la pacienton, sed ne kuraci la brulvundon. Multaj elsavitaj pacientoj devis plu suferi.” Lia konigo profunde impresis min, ke li estas homo malkaŝema kaj memfida.


Li informis al mi, ke la seka terapio ne povas solvi la jenajn problemojn: forigi vundan doloron, infekton, pusadon, progresan nekrozon de brulvunditaj histoj kaj kuraci duagradan vundon. Sed lia terapio fundamente solvis tiujn problemojn. Ĝi estas efika por forigi doloron, eviti infekton kaj akceli

histan regeneriĝon de sango-stagna zono, duagrada brulvundo ne lasas cikatrojn post kuraco. Tio ebligis al la klinika kuracefiko de la senŝirma humida brulvunda terapio atingi avangardan nivelon de la monda brulvunda medicino. Li faris al mi supran rakontadon, montrante bildojn sur la videobendo pri brulvunditaj pacientoj antaŭ kaj post kuracado. La brulvundo estis tre timiga, sed la kuracefiko miriga.

Kiam 13-jara vilaĝa knabino Liu Xuezhi (Liŭ Ŝjueĝi), vundita de alttensia elektro, estis portita en la Nanyang-an Brulvundan Kuracan Centron de Henan-provinco, sur ŝiaj serioze brulvunditaj manplatoj kaj piedfingroj jam vidiĝis karbigintaj ostoj. La centro aplikis al ŝi la novan terapion de Xu Rongxiang. Post nelonge resaniĝis ŝiaj brulvundoj. Kuracistoj diris, ke laŭ la tradicia terapio tiel serioze elektrovunditaj manoj kaj piedoj devas esti amputitaj, alie la vundo minacos ŝian vivon. Sed la nova terapio savis ŝin de eventuala kripligo.

Xu Rongxiang faras ekzamenon al paciento.

Foto de **LUO MINGYANG**



Jam en la fina periodo de la 70-aj jaroj, kiam Xu Rongxiang studis en la okcident-medicina fakultato de la Qingdao (Ĉingdaŭ)-a Medicina Instituto, li jam deziris novan terapion por kuraci brulvundon. En someraj ferioj li en iu hospitalo flegis 5-jaran knabon, kies brulvundita areo kovris 40% de tiu de lia korpo. Tiam la vundoj de la knabo estis plene kovritaj de krustoj, ofte krevis kaj sangis je ajna tuŝo, tio tre doloris la knabon.

“Ĉu ne estas pli bona metodo?” li demandis.

“Tio estas metodo plej vaste uzata

en la mondo,” respondis la kuracisto.

Korŝiris Xu Rongxiang tio, ke la terapio, kiu kaŭzas al pacientoj neelteneblan doloron, estas ĝenerale uzata en la mondo. Xu Rongxiang, deveninta de ĉinmedicinista familio, komencis fari kompletan esplorado. Li konsultis grandan kvanton da en- kaj eksterlandaj materialoj pri brulvundo kaj fine trovis, ke la teoria bazo de seka terapio apartiĝas de la brulvunda patologio kaj histologio. Por preventi infekton kaj savi la pacientojn, multaj refunkciigebaj vunditaj histoj estas forlasitaj kaj nekrozitaj.

Xu Rongxiang decidis unue esplori la ĉinmedicinan farmakologion por trovi idealan medicinaĵon kontraŭ brulvundo. Li opiniis, ke la brulvunditoj suferas komence de vundo kaj poste de pusado, t.e. infekto. Tial oni devas unue kuraci la vundon kaj poste forigi la pusadon. Por kuraci la vundon oni devas cirkuligi la sangon por forigi kongestadon. Por forigi la pusadon oni devas sin senfebrigi kaj senvenenigi. Laŭ la teorio de la ĉina medicino la du kuracmanieroj estas kontraŭaj. Oni malfacile trovas medikamenton kun la du efikoj. Sed dank’ al senlaca esploro, fine Xu Rongxiang sukcese faris medicinaĵon kun la du kuracefikoj — humidan brulvundan unĝventon.

“Kio estas la principo de la humida brulvunda terapio?” mi demandis.

“Laŭ la ĉin-medicina teorio la brulvundo estas ‘tero’. Sen ‘akvo’ la ‘tero’ ne havas vivon. La brulvunditaj histoj ne povas kreski sen ‘akvo’, nome korpa likvo. Por tio oni devas teni la brulvundon humida kaj seninfekta. Laŭ la sciencaj atingoj de la modernaj patologi-fiziologio, histologio kaj biologio de la okcidenta medicino, mi kreis serion da kuracaj rimedoj por penetrigi la medicinaĵon en la vundon, teni la vundon humida, preventi kaj elimini partan mikrocirkulan perturban, likvigi kaj forigi nekrozajn histojn, kulturi la restan epidermon, reguligi la histo-riparan proporcion, sendolori-



Antaŭ kuracado

gi kaj antiinfekti. Tio estas senŝirma humida brulvunda terapio.”

Printempe de 1981, Xu Rongxiang provizore laboris en la Centra Hospitalo de la urbo Zibo. Tie li konatiĝis kun paciento Xu Shengbao (Ŝju Ŝengbaŭ). Tiu estis brulvundita de nitrata acido kaj kuŝis en la hospitalo 10 monatojn. Ulceriĝis liaj malsupraj membroj. Oni greftis al li haŭton 4-foje, sed malsukcesis. La vundoj infektiis lin plurfoje. Atrofiigis liaj gambaj muskoloj. La kuracistoj tamen havis neniun efikan kuracrimedon.

Venis la ŝanco. Xu Rongxiang sin rekomendis al kuracado de la paciento. Antaŭ tio li multfoje faris provon kaj jam havis sperton de resanigo de pli ol 30 brulvunditoj. Li ŝmiris la vundojn de la paciento per sia unĝvento kaj rapide neniigis la ulceron. Post 15 tagoj Xu Shengbao resaniĝis kaj elhospitaliĝis. La informo faris sensacion en la hospitalo. Kuraco-petantaj brulvunditoj venis al li unu post alia. En duonjaro li konis pli ol 200 kazojn.

En la fino de 1981, Xu Rongxiang prezentis sian disertaĵon kun 120 000 ideografiaĵoj pri senŝirma humida terapio kun teoria argumento kaj praktikaj spertoj.

En la sekvaj jaroj Xu Rongxiang suferis de multaj malfaciloj kaj renkontis malhelpojn pro sia brulvunda terapio kontraŭ la tradicia koncepto. Sed li estis certa, ke por ĉiu ajn scienca atingo estas malfacile akiri la socian aprobon. Li do daŭrigis sian esplorado, iris al pluraj lokoj por konsulti koncernajn faku-



Post kuracado

lojn. Li fine akiris aprobon kaj kuraciĝon de la medicinaj fakuloj. Ankaŭ lia klinika sukceso konvinkis multajn brulvundajn fakulojn, kiuj okupiĝis pri la tradicia terapio dum multaj jaroj.

Komence de 1987 Xu Rongxiang fondis la Guangming-an Brulvundan kaj Traŭmatan Instituton. En la sama jaro oni aljuĝis al lia senŝirma humida brulvunda terapio gravan scienc-teknikan frukton de la ŝtato, 1987. En marto de 1988 la humida brulvunda unĝvento estis sankciita kiel nova medikamento de la Ĉina Popola Respubliko, pri tio ĵurnalista rondo publikigis informon en- kaj eksterlande.

Nun en Ĉinio rapide disvastiĝas la nova brulvunda terapio de Xu Rongxiang. Pli ol 3 000 ĉinaj kuracistoj estas trejnataj tiurilate. En Pekino, Nanyang, Dalian, Ŝenyang kaj aliaj urboj sinsekve fondiĝis dekoj da kuracaj centroj de brulvundo, aplikantaj la novajn terapiojn kaj medikamenton. Centoj da kuracejoj naskiĝis en aliaj provincoj kaj urboj.

En la fino de 1988 okazis en Pekino la Unua Tutlanda Simpozio de Humida Brulvunda Terapio de Ĉinio. Surbaze de la grandaj sukcesoj akiritaj de la brulvunda humida terapio, la simpozio anoncis, ke la brulvunda kuracado eniris en novan stacion de humida kuracado.

Xu Rongxiang kun ekscitiĝo diris al mi, ke baldaŭ aperos la de li redaktata revuo “Ĉina Brulvundo kaj Traŭmato”. En tio mi vidis kuraciĝon de tiu juna fakulo. ■

● En la unua duonjaro de 1989 la totala industria produktovaloro de Ĉinio atingis 639.6 miliardojn da juanoj, je 10.8% pli multe ol tiu en la pasinta jaro.

● Dank' al la 28-jara disvolviĝo en Ĉinio formiĝis granda internacia ocean-transporta korporacio, kiu havas pli ol 600 ŝipojn kun 14 milionoj da toneloj.

● Samtempe kun la starigo de specialaj ekonomiaj distriktoj kaj plenenergia disvolvo de eksportataj produktaĵoj en la regiono de la orienta marbordo de Ĉinio, nun malfermiĝas koridoro al aliaj landoj en la okcidenta parto de Ĉinio, por disvolvi ekonomian kaj kulturan kunlaboron kun la arabaj landoj kaj eĉ la tuta islama mondo, plenergie vigligi komercon ĉe la okcidenta landlimo kaj fari ekonomian kaj teknikan interŝanĝon kun Sovetunio kaj la orienta kaj okcidenta Eŭropo per la islamaj regionoj de nordokcidenta Ĉinio.

● La 14-an de julio, en la Ĉina Internacia Ekspona Centro, Pekino, inaŭguriĝis la Internacia Foiro okazigita de Ĉinio. En ĝi 29 landoj kaj regionoj eksponis siajn produk-

Ĉeestantoj de la kunsido sur Tian'anmen-placo



Sovetiaj okulistoj en ĉina hospitalo

taĵojn.

● Laŭ materialoj liveritaj de la Ĉina Industri-Komerca Banko, nun la pofamilia depon-sumo en la ĉinaj urboj superis 1 500 juanojn, je 1 100 juanoj pli multe ol tiu en 1979.

● Jam finiĝis la drago de la Pekin-Hangzhou-a Kanalo kaj Qiantang(Ĉjantang)-rivero. La dragita parto komenciĝas de

Genshanmen-haveno en la norda antaŭurbo de Hangzhou, la ĉefurbo de Zhejiang(Ĝeĝjang)-provinco, kaj finiĝas ĉe Sanbao en ĝia orienta antaŭurbo, kun longo de 6.97 km. Ĝi havas profundan signifon por mildigi la streĉitecon de energio de la Ŝanhaja Ekonomia Distrikto, ordigi medion, akceli irigacion kaj plivigligi turismon.

● En la Pariza Internacia Foiro oran medalon ricevis la ĉiopova polur-maŝino, kiu kapablas poluri, faceti, bori kaj kaneli. Ĝi, farita de la Bishan-a Konstrua Maŝinfabriko de Chongqing (Ĉongĉing), estas tre ŝatata en Eŭropo kaj norda Afriko.

● Nun pli ol 100 landoj kaj regionoj kunlaboras kun Ĉinio en medicino. Ĉiujare 2 000 fakaj medicinistoj el diversaj landoj esploras aŭ studas en Ĉinio. 50 landoj akceptas ĉinajn kuracistojn. De 1980 ĝis nun, ĉinaj kuracistoj kuracis pli ol 100 milionojn da homoj eksterlande.

● El la tombaroj de la Militantaj Regnoj, Qin(Ĉin)- kaj Handinastioj en Fangmatan de la urbo Tianshui (Tjanŝuj), Gansuprovinco, nordokcidenta Ĉinio, antaŭ nelonge elteriĝis 7 lignogravur-

itaj mapoj faritaj en 239 a.K. La mapoj estas tre valoraj por studi la historion de la ĉina maparto.

● La 24-an de junio, ĉinaj sportistoj gajnis unu oran medalon kaj du argentajn medalojn en la finalo de vira solludo de la internacia gimnastika konkurso Konica, 1989, en Brisbano.

● Marte de 1989, pro la tumulto okazinta en Tibeto, Ĉinio, la ĉina registaro decidis praktiki militan leĝon en la loko kaj malpermesis al eksterlandanoj tien vojaĝi. Ricevinte la konsenton de koncerna departemento de la registaro, pli-ol-10-turista grupo el alia lando rajtas vojaĝi al Tibeto ekde julio ĉi-jare.

● Dank' al observado kaj esplorado dum du jaroj kaj duono, ĉinaj astronomoj montris, ke la suna aktivado, pli kaj pli intensiĝanta, atingos sian kulminon en la unua duonjaro de 1990. La intensiĝo de ĝia aktivado atingos probable la duan kulminon, kiun konas la historio.

● Ĉina mikroskulptisto Ge Bi kaj liaj du filinoj post 4-jara penado skulptis sur santala tabulo kun areo de 1.5 kvadrataj metroj la pejzaĝojn de Yuanmingyuan, la plej bela el ĉiuj ĝardenoj, kun 333-hektara lago, 6 000 pavilonoj, terasoj kaj domoj, sennombraj ĝardenoj, pontoj kaj homfiguroj. La skulptita Yuanmingyuan bele iluminata kaj akompanata de muziko sentigas la rigardantojn kvazaŭ en ĝi. Yuanmingyuan ekkonstruiĝis en 1709 en la okcidenta antaŭurbo de Pekino kaj estis forbruligita de la Brit-Franca Alianca Armeo en 1890.


● La ĉina revuo "Banyuetan" faris enketon pri la publika opinio de 3 735 homoj de marto ĝis majo, postulante respondi, kiuj 3 aferoj, laŭ ili, estas la plej gravaj el la 8 problemoj multe zorgataj de la socio. 78.15% de la enketitoj opiniis, ke tio estas serioze reordigi la Partion kaj likvidi la dekadencan. 65.49% de la enketitoj opiniis, ke

tio estas mildigi la kurz-altigon kaj ĉesigi inflacion. Kaj 38.90% de la enketitoj opiniis, ke plej grave estas kiel eble plej efike garantii la socian sekurecon.

● La "Ĉina Geologia Ĵurnalo" informas, ke ĉiujare la Flava Rivero enlutas 27 kvadratajn kilometrojn de Bohai-maro. En la pasintaj 134 jaroj ĝi faris proksimume 3 000 kvadratajn kilometrojn da tero.

● Ĉi-jare, en la ĉinaj urboj ĉ. 10.5 milionoj da homoj deziras havi laboron. La entreprenoj de la tutpopola, kolektiva kaj alia posedantecoj akceptos 4.2 milionojn da homoj kaj 0.7 miliono da homoj okupiĝos pri individua laboro, tial antaŭ la jarfino restos 5.6 milionoj da senlaboruloj, t.e. 3.8% de la ĉinoj estos senlaboraj.

● La 7-an, 8-an kaj 9-an de julio, 1989, okazis ekzameno enira al



La mikroskulptaĵo "Yuanmingyuan" (Parto)

superaj lernejoj de Ĉinio. 2 661 801 homoj partoprenis la ekzamenon.

● La 12-an de julio, 440 turistoj-entreprenistoj de 270 turismaj servoj el 29 landoj kaj regionoj kolektiĝis en Pekino por ĉeesti la internacian kunsidon pri turismo, 1989. En la kunsido la ĉeestantoj diskutis kaj ĉeloke esploris, kiel bone kaj rapide disvolvi la ĉinan turismon. Posttagmeze, la ĉeestantoj ĝoje ascendis Tian'anmen-turon kaj promenis sur Tian'anmen-placo.

La peranto de "EL POPOLA ĈINIO" en Venezuelo

Samideano

DAVID G. VALECILLOS V.

Calle 79 No. 3C-72

MARACAIBO-4002. VENEZUELO

bonvenigas ankaŭ abonkotizojn en ĉiuj latinamerikaj landoj, en kiuj ne estas perantoj de ĉi tiu revuo.

BONVENON AL ABONANTOJ DE "EL POPOLA ĈINIO" EN LATINAMERIKO!

Patrino kaj filino, fortaj flugpilkistinoj

EN trejna halo streĉe trejniĝas la reorganizita Ĉina Virina Flugpilka Teamo. En varma tago la knabinoj tramalsekiĝis de ŝvito. Tamen ili ankoraŭ ne intencis ripozi. Mia rigardo sekvis knabinon forte frapantan pilkon. Ŝi estas nova elstara flugpilkistino He Yunshu.

Ŝi naskiĝis en sportista familio en Fujian(Fuĝjan)-provinco. Ŝia patro estis ĉefa centra avanulo de la Ĉina Vira Korbopilka Teamo kaj ŝia patrino estis elstara membro de la Ĉina Virina Flugpilka Teamo en la 60-aj jaroj. Ŝi suriris la saman vojon kiel la patrino kaj ili ambaŭ fariĝis ĉefludistoj de la Ĉina Virina Flugpilka Teamo.

La knabino estas saĝa kaj bela. Je la unua vido mi ekŝatis ŝin. Ŝi rakontis al mi, kiel ŝi kreskis, kaj pli multe, kiel ŝia patrino kulturis

ŝin.

En la infaneco ŝi ofte iris al sportejo kune kun la patrino por rigardi pilkoludon. Ŝi estis interesita de flugpilkado. La patrino bone konas malfacilojn en flugpilkado. Ŝi deziris, ke la filino vizitu altlernejon. Sed la filino insistis pri flugpilka ludo. La patrino, kiu tiam estis ĉeftrejnistino de la Fujian-provinca teamo, vole nevole konsentis kaj mem trejnis ŝin.

Pasis unu jaro. He Yunshu progresis rapide. Tamen la patrino trovis, ke ŝi tenas la korpon rekte kaj frapas pilkon ne forte. Tio estas grava manko de flugpilkisto. Laŭ ŝia sperto la patrino ellaboris serion da trejnaj metodoj por korekti ŝiajn malĝustajn movojn. Nokte en sportejo la filino ĉiam forte frapis pilkon akompanate de la krio de la patrino: "Rapidu! Pli rapide movu

la brakon!"

Iun vesperon, ĵus reveninte de la trejnado, la filino diris al la patrino: "Panjo, lastatempe mi frapis pilkon iom pli rapide." Karesante la maldikiĝantan vizaĝon de la filino, la patrino ridis ĝoje.

"Panjo, mi volas vojaĝi al la hejmloko en ferioj por viziti la avinon." Dum la patrino estis en ĝojo, la filino tuj prezentis la peton. Ŝi vivis ĉe la avino en la infaneco kaj tre amas la avinon.

Tion aŭdinte, la patrino serioze diris: "Yunshu, en la pasintaj du jaroj vi ne bone posedis la fundamentan teknikon. La venontaj du jaroj estos tre gravaj por atingi sukceson." La filino mallevis la kapon kaj komprenis, ke la patrino metis la esperon sur ŝin. En 1966 la tekniko de la patrino estis alta kaj ŝia teamo enviciĝis inter tri fortaj teamoj de la mondo. Ĝuste kiam la Ĉina Virina Flugpilka Teamo sin preparis por partopreni en la monda ĉampioneca konkurso, la deziro gajni la oran metalon disŝaŭmiĝis pro la ŝanĝiĝo de la politika situacio. La patrino ĉiam bedaŭris pro tio. Yunshu bone komprenis la patrinon. Ĉiumatene ŝi silente sekvis la patrinon al la sportejo. La 20 libertagojn ŝi pasigis en ŝvito. Kaj ŝia tekniko progresis tagon post tago.

En 1987 He Yunshu estis akceptita en la Ĉinan Junulinan Flugpilkan Teamon. Ŝi partoprenis en la Monda Ĉampioneca Junulina Flugpilka Konkurso okazinta en tiu jaro kaj estis honorita per la titolo "plej bona sportisto". En

Su Caixia (la dua de maldekstre) kaj He Yunshu (dekstre)



majo de la sekvanta jaro ŝi eniris en la duan teamon de la ŝtato kaj en la komenco de la kuranta jaro en la Ĉinan Virinan Flugpilkan Teamon.

Kvankam He Yunshu sciis, ke la patrino estis fame konata estro de la Ĉina Virina Flugpilka Teamo, tamen tion ŝi neniam menciis. Estas interesa anekdoto. En 1986 ŝi iris al provinc-teama sportejo por vintra trejnado. Trejnisto de la Vira Flugpilka Teamo de najbara provinco estas konato de ŝia patrino. Li ne renkontis ŝin dum longa tempo kaj intencis informi pri ŝi. Hazarde li demandis He Yunshu: "Ĉu vi konas trejniston de via provinca teamo Su Caixia?" Ŝi levigis la brovojn kaj diris: "Kompreneble!" "Kiel ŝi fartas? Transdonu mian saluton al ŝi!" Tuj kiam li foriris, ŝi ridis petole. Post dumonata trejnado la trejnisto sciis la veron kaj ridante diris: "Bubaĉo, vi eĉ ruzis kontraŭ mi."

Por la patrino kaj filino flugpilko estas nemankigebla paroltemo en ilia vivo. Eĉ post kiam la filino iris al malproksima loko, flugpilko ankoraŭ estis la ĉefa enhavo de ilia korespondo. Por la filino la leteroj de la patrino ja estas granda konsolo.

En tiuj tagoj, nelonge post kiam He Yunshu eniris en la Duan Ĉinan Virinan Flugpilkan Teamon, ŝi ne povis tuj alkitimiĝi al intensa trejnado kaj intencis sin retiri. La patrino ĝustatempe skribis al ŝi: "Yunshu, trejnado por ŝtat-nivela



He Yunshu en trejnado

sportisto estas tre peniga kaj laciga. Vi iris glatan vojon ĉu en vivo ĉu en kariero. Nun vi havas ŝancon fari penadon kaj sperti lacigon. Kvankam tion mi ne volis kaj eĉ iam bedaŭris, ke mi lasis vin elekti tiun karieron, tamen tion mi aprobis konsciencie. Post penado kaj laciĝo vi komprenos, ke venko ne estas facile akirebla, kaj komprenos kiel trakti la vivon kaj la flugpilkan karieron. Estu firmvoĉa, mia infano!"

La vortoj de la patrino helpis He Yunshu venki malfacilojn unu post alia. Se ŝi estis libera, ŝi senescepte skribis longan leteron al la patrino pri siaj ĝojo, ĉagreno, ofendiĝo...

La penso de la filino ne estas sekreta kontraŭ la patrino. Ŝi eĉ ne

kaŝis sian eraron antaŭ la patrino. Foje en trejnado la trejnisto ordonis, ke ŝi forte frapu pilkon 20-foje laŭ rekta linio. Kiam ŝi finis la lastan frapon, la trejnisto diris: "Malbone, denove!" Ŝi obstinis: "Mi frapis laŭ rekta linio, Kial malbone?" Dirinte, ŝi tuj foriris. Pro tio la estro de la teamo kritikis ŝin kaj ŝi ege pentis pri sia kulpo. Poste ŝi skribis al la patrino: "Ĉi-foje mi estas malprava. Mi konscias, ke la trejnisto rigore trejnis min por progresigi min. Estonte mi certe ne faros tian stultajon. Ĉu vi pardonos min, panjo?"

La patrino plej bone komprenas la filinon. Ŝi vidis, ke la filino maturiĝis; se la filino estus ĉe ŝi, ŝi certe preparus kelkajn pladojn preferatajn de ŝi. ■

KONTRIBUU POR LA RUBRIKO "MI KAJ ĈINIO"

Karaj legantoj

Por festi la 40-jariĝon de EPĈ en la venonta majo, ni petas vian kontribuon por la rubriko "Mi kaj Ĉinio".

Vi povas verki pri: impreso pri Ĉinio, amika kontakto kun ĉinoj aŭ ĉinaj esperantistoj, amikeco kun EPĈ ktp. Via artikolo povas esti en ajna stilo aŭ formo, sed ne pli-ol-tri-paĝa (laŭ la formato de EPĈ). Bonvenaj estas koncernaj fotoj (inkl. de portreto de la aŭtoro). Limdato: la 31-a de januaro 1990 (laŭ vialoka poŝtstampo).

Ni aperigos bonajn verkojn el la kontribuoj en EPĈ. Ni aljuĝos la unuan premion al 1, duan premion al 3 kaj trian premion al 5 kontribuintoj. La premioj estos ĉinaj metiartaĵoj. Nepremiitaj kontribuintoj ricevos donaceton.

La rezulto de la aljuĝo legiĝos en la 6-a numero de 1990.

Ni anticipe dankas vin por la kunlaboro.

La Red.

Originalaj naciaj kostumoj

de ZANG JIENIAN




En buji-a kostumo




En pavokostumo

En kameli-kostumo

En ji-a kostumo Foto de HAN WUPING





En mjaŭ-a kostumo

EN la lastaj jaroj multe ŝanĝiĝis la vestoj de ĉinoj. La fasonoj, kiuj elspiras modernecon, eniris en la ĉiutagan vivon. Profunde impresis min prezentado de belaj fasonoj en la urbo Kunming, Yunnan-provinco, en la sudokcidenta parto de Ĉinio.

En melodio de naciaj muzikiloj dekelkaj manekenoj laŭvice sursceniĝis. Per graciaj dancmovoj ili montris al la publiko originalajn naciajn kostumojn.

Tiuj kostumoj estis projektitaj de junaj fasonistoj de la Pacifika Vestokompanio. Yunnan estas provinco kun multaj nacioj. La fasonistoj faras renovigon, ĉerpante

sukon de diversaj naciaj kostumoj, tiel ke la novaj fasonoj havas ne nur apartan nacian guston, sed ankaŭ karakterojn artismajn, modernajn kaj praktikajn.

Kameli-kostumo konservas la okulfrapajn kolorojn kaj fajnan brodadon de vestoj de baj-aj virinoj. La renovigo estas, ke oni ne plu surhavas blankan ĵaketon, portas senmanikan altkoluman ĵerzon anstataŭ bunta veŝto kaj blankan pantalonon anstataŭ la larĝa blua. La kostumo ne nur reliefigas la buntecon de ĵaketo, sed ankaŭ prezentas la ŝaton de bajoj al blanko. Ĝi aspektas delikata kaj okulplaĉa.

La multbranĉa ji-nacio vivas ĉie

en Yunnan-provinco. Tial ĝiaj kostumoj estas multspecaj. Konsultante tradiciajn ji-ajn kostumojn, la fasonistoj kreis novajn fasonojn. El ili la larĝa kitelo estas fasonita imite al "Caerwa" (ĝisgenue longa mantelo kun longaj frangoj ĉe la malsupro), kiun portas ji-aj viroj kaj virinoj en nordorienta Yunnan. Ĝi prezentas la bravecon de ji-oj.

Sursceniĝis knabinoj en diverskoloraj ĵaketoj kaj longaj jupoj, kiuj rememorigas la vestojn de tiaj naciaj virinoj en la regiono Xishuangbanna. Tiu nova fasono, pavo-kostumo, konservas la graciecon de taj-aj vestoj kaj montras la belecon de nokta ceremonia kostumo.

Prezentiĝis ankaŭ la purpur-rododendra jako de hani-oj, la tripeca jupo de ĝuang-oj, la multfalbala jupo de mjaŭ-oj, la stel-luna kostumo de naŝi-oj kaj la blank-blua kostumo de buji-oj. Prezentiĝis sume 29 kategorioj el 200 specoj.

Post spekto de la prezentado, mi vizitis respondeculojn de la Pacifika Vestokompanio kaj manekena grupo. Ili diris al mi, ke pro la baro de Hengduan-montaro, maloportunas la kontakto inter Yunnan kaj aliaj lokoj de la lando, kaj tio faris la lokon postĝinta ekonomie kaj komerce. Kvankam la tieaj vestofarantoj estas lertaj, tamen pro la postĝinteco de la loka tekstila industrio, plejparto de ŝtofoj venas el aliaj provincoj. Se ili paŝo-postpaŝe sekvus la rutinon de enkaj eksterlanda fasonado, ili estus ĉiam postlasitaj. Ili do decidis disvolvi nacian fasonadon laŭ la realeco de Yunnan-aj nacioj. 24 nacimalplimulto en Yunnan atentas sian vestadon kaj ornamon, kaj ĉiu nacio havas sian apartecon en fasonado kaj kolorkunmeto. Jen deirpunkto de la kompanio por disvolvi la entreprenon pri naciaj kostumoj. En tio la kompanio trabatis al si novan vojon. Nun la kompanio ne nur akceptas mendojn de fasonkompanioj en ĉinaj urbegoj, sed ankaŭ tiras al si la atenton de komercistoj el Hongkong kaj sudorienta Azio. ■

CHONGQING-A HUOGUO

Teksto de WEI RAN
Fotoj de LIU SIGONG

HUOGUO estas manĝaĵo tre ŝatata de ĉinoj. En norda Ĉinio huoguo el ŝafaĵo estas fama jam de longe. Maje de 1989 mi estis feliĉa kaj manĝis la Chongqing-an huoguo en Sichuan-provinco.

La ĉefa materialo de la Chongqing-a huoguo estas bova tripo, kiu estas ne nur nutroriĉa, sed ankaŭ bongusta. Ĝian fragilecon decidas modera kuirtempo. Kuirita tro longe, ĝi fariĝis malmola. Alie ĝi restas kruda kaj nemanĝebla. Tial manĝi ĝin estas plezuro. Krom bova tripo, ankaŭ porka reno, anasa intesto k.a. estas prenataj kiel ĝiaj materialoj. Preparante huoguo, unue oni metas angilojn, pecojn de sangkazeo kaj tohuo, kaj poste ŝaloton, junajn ajlopedunklojn, brasikon kaj aliajn legomojn.

La kondimentoj konsistas el bova graso, fermentinta sojfabo, fruktoj de zantoksilo (*Zanthoxylum bungeanum*), papriko, pecigitaj sojfaboj, kando, spicvino, feĉo de alkoholaĵo k.a. Ĝuste dank' al tiuj kondimentoj, la Chongqing-a huoguo estas fortgusta, neoleza kaj apetitiveka.

Antaŭe oni vendis huoguo surstrate: sur fornon, oni metis grandan paton septitan en 9 partoj per bambuaj aŭ lignaj kradoj, kun bolanta sala akvo ene, tial 9 nekonatoj povis ĝui la frandaĵon samtempe el la sama pato. Poste, por forigi malagrablan odoron, oni aldonis en la akvon fruktojn de zantoksilo kaj paprikon. De tiam, la gusto de zantoksilo kaj papriko fariĝis originala trajto de la Chongqing-a huoguo.

Plejparto de huoguo-manĝantoj estis transportistoj. Poste aperis restoracio de huoguo, kie servis patoj nur al unu sola kliento, dank' al tio ankaŭ mez- kaj supertavolaj

personoj komencis preni la manĝaĵon. Jen ekfuroris la Chongqing-a huoguo eĉ en aliaj lokoj de Sichuan.

Ĝenerale oni preferas huoguo en

Kuiristo en preparado de pladoj



profunda aŭtuno, vintro kaj frua printempo, sed la Chongqing-a huoguo estas preferata en ĉiu sezono. En frosta vintro ĝi sendube plaĉas al ĉiuj. Ĝi estas ŝatata ankaŭ en profunda aŭtuno kaj frua printempo, kaj en varma somero, precipe en la someraj tagoj de varmega Chongqing, oni ankoraŭ prenas ĝin: Sub la arda suno, la mangantoj sidas ĉirkaŭ la forno kaj la pato plena de bolanta akvo kaj, tenante mangbastonetojn per unu mano kaj svingante ventumilon per la alia, brogas kaj mangas.

La Chongqing-a huoguo furoris kaj malfuroris kun la loka kaj tutlanda ekonomio. En la komenco de la 50-aj jaroj ĝi furoris. En la fino de la 50-aj jaroj kaj komenco de la 60-aj jaroj ĝi preskaŭ tute malaperis pro manko de materialoj. Nun ĝia bonodoro sentigas ĉie en la monturbo Chongqing pro la ekonomia prospero. ■

Malgranda kliento



En restoracio



La haloj Zhonghe kaj Baohe

Teksto de MU YI


Fotoj de WEN FA kaj YAN JIN

POST la halo Taihe estas la haloj Zhonghe kaj Baohe. La tri haloj sidantaj sur la sama I-forma bazamento formis la centron de la konstruaĵoj de la Imperiestra Palaco.


La halo Zhonghe havas kvadratan piramidan tegmenton unualeran. La orumita globo meze de la tegmento reflektas sunradiojn. La halo kun trono interne kovras 580 kvadratajn metrojn. La plafono estis delikate gravurita kaj bele farbita.

Ĉe la komenco de Ming-dinastio (1368-1644) la halo estis konstruita en kvadrata formo pro ĝia aparta uzo. En la tri gravaj festoj, nome la unua tago de la nova jaro, la tago de vintra solstico kaj la datreveno de naskiĝo de imperiestro, antaŭ ol veni al Taihe-halo, imperiestroj unue ripozis en Zhonghe-halo. Kiam en Taihe-halo ĉio estis preta, ili venis al Taihe-halo por akcepti gratulantojn, tial Zhonghe-halo, ĝenerale dirite, funkciis kiel prepara loko por la oficiala ceremonio en Taihe-halo. Nun en Zhonghe-halo vidiĝas palankenoj de imperiestroj.

Krome, kiam venis printempo, la imperiestroj de la dinastioj Ming kaj Qing (1644-1911) devis fari kultron en la Altaro de Agrikultura Dio sude de la urbo. Antaŭ tio imperiestroj devis legi oracion kaj ekzameni agrikulturilojn kaj semojn. En la sekvanta tago, akompanate de gvardio, orkestro kaj sekvantaro, imperiestro veturis




En Zhonghe-halo



Palankeno por imperiestro

PLANO DE LA MALPERMESITA URBO



N-roj 5 kaj 6 en la plano signas la halojn Zhonghe kaj Baohe.

al la altaro por inaŭguri riton de plugo. En muziko imperiestro proprane manipulis plugilon kaj disjetis semojn. Tion la imperiestro ripetis kvarfoje. Lin laŭvice imitis la princoj kaj korteganoj. Post tio imperiestro proklamis komencon de la printempa plugado.

La imperiestroj de la du dinastioj alte taksis la ceremonion de titolado por sia patrino kaj aranĝado de geneologio de la imperiestra familio. La imperiestroj devis legi en Zhonghe-halo la dokumentojn pri la titolado. En Qing-dinastio la geneologio de la imperiestra familio devis esti rekompilita en ĉiu deka jaro. Kiam oni prezentis al imperiestro la rekompilitan genealogion por lia ekzameno, oni faris solenan ceremonion en Zhonghe-halo.

Baohe-halo kun trono en si kaj dualera tegmento kovras 1 240 kvadratajn metrojn. La halo ŝajnas tre vasta kaj hela pro malmulteco

de kolonoj.

Malantaŭ Baohe-halo la plej okulfrapa estas giganta ŝtona bloko kun reliefaj drakoj, kiu inkrustiĝas en la ŝtuparo. Ĝi estas la plej granda gravurita ŝtono en la Imperiestra Palaco. Sur la ŝtona bloko longa 16.57 metrojn, larĝa 3.07 metrojn, dika 1.7 metrojn kaj peza pli ol 200 tunojn viglas 9 versimilaj drakoj en nuboj. Ĝi peza 300 tunojn antaŭ la prilaboro devenis de Fangshan en la antaŭur-

bo de Pekino. Transportado de tiom giganta ŝtono estis malfacilega por homoj antaŭ 500 jaroj. Libro notis, ke tiam oni transportis la ŝtonan blokon en vintro. Sur la 50-kilometra vojo de la ŝtonhakejo ĝis la Imperiestra Palaco oni fosis putojn kun interspaco de 50 metroj. Oni ĉerpis el la putoj akvon kaj verŝis ĝin sur la vojon. Dudek mil homoj kaj mil ŝarĝobrutoj tiris la ŝtonan blokon sur la glaciiginta vojo. La transportado daŭris 28 tagojn kaj konsumis 110 mil taelojn da arĝento.

En Ming-dinastio, ĉe la oficiala instalo de imperiestra edzino, korteganoj devis iri gratuli kaj prezenti gratulan artikolon. Tiam la imperiestro devis unue veni al Baohe-halo por tie surhavi ceremoniajn vestojn kaj poste iri al Taihe-halo por akcepti la gratulantojn. Post tio li reiris en Baohe-halon por ŝanĝi la veston. Krome imperiestroj ofte donis festenojn tie al la korte-

ganoj. Ankaŭ ĉe la instalo de kronprino, la imperiestro sin vestis per ceremonia kostumo en Baohe-halo kaj poste iris al Taihe-halo.

En Qing-dinastio pli kaj pli multaj aktivadoj okazis en Baohe-halo. En la halo por edzino de princino imperiestroj festenis princojn kaj korteganojn super la tria klaso, novelon de la princino, lian patron kaj liajn mandarenigintajn familianojn. Antaŭvespere de la nova jaro kaj antaŭ la 15-a de la unua monato de ĉiu jaro imperiestroj en Baohe-halo festenis la mongolajn princojn kaj altrungulojn de la registaro. La plej grandioza novjara festeno okazis antaŭvespere de 1798. La festeno ĉeestis pli ol 1 300 personoj. La festeno el 550 tabloj konsumis 500 mil taelojn da arĝento. Fakte ĝuste de tiu jaro la dinastio komencis dekadenci.

En la mezaj kaj postaj jaroj de Qing-dinastio Baohe-halo funkciis kiel loko, kie imperiestroj ekzamenis intelektulojn por instali oficistojn. La feŭdisma socio de Ĉinio praktikis enoficigan ekzamenon. Kortega ekzameno estis plej alta, kiu okazis en ĉiu tria jaro. Laŭ regulo de la ŝtata enoficiga ekzameno, ĉiu lernanto, kiu studis la klasikajn konfuceanisman verkojn plurajn jarojn kaj sukcesis en ekzameno, povis akiri la titolon *ŝengjŭan*, alinome *ŝiŭcaj*. Post kelk-jara studo en lernejo de gubernio kaj prefektujo, *ŝiŭcaj* povis partopreni en plia ekzameno kaj la sukcesintoj ricevis la titolon *ĝjujen*, kaj la plej elstara el ili estis nomata *ĝjejŭan*. *Ĝjujen* devis partopreni en ekzameno aranĝita de la rita ministerio, kaj la sukcesintoj ricevis la titolon *gongŝeng*, dum la unua plejsukcesinto estis nomata *hujjŭan*. Nur *gongŝeng* rajtis partopreni en kortega ekzameno.

La registaro de Qing-dinastio alte taksis la kortegan ekzamenon. En la tago de la kortega ekzameno oni devis aranĝi solenan ceremonion. Antaŭtage koncernaj oficistoj pretigis en Baohe-halo tablon tegitan per flava silkaĵo destinita por

ekzamenaj paperoj, kaj ambaŭ-flanke estis numeritaj tabloj por ekzamenatoj. Ĉe la tagiĝo ekzamenotaj *gongšeng* en ceremoniaj kostumoj viciĝis sur la perono antaŭ Baohe-halo. Tiuj de neparaj numeroj staris oriente kaj tiuj de paraj numeroj okcidente, dume la princoj kaj korteganoj staris en kaj ekster la halo. Kiam ĉio estis preta, leviĝis muziko kaj la imperiestro venis en la halon. La ekzamenatoj, la princoj kaj la korteganoj trifoje genuiĝis kaj naŭfoje kapklinis ĝistere. Poste grava kortegano *daŝjueŝi* venis en la halon kun ekzamenaj paperoj. Oficistoj de la rita ministerio respektoplene metis la paperojn sur la tablon tegitan per flava silkaĵo. La ekzamenatoj riverencis al la ekzamenaj paperoj, prenis ilin, iris al sia tablo kaj komencis skribadon.

La ekzamenaj temoj estis sekrete preparitaj de speciala oficisto kaj sankciitaj de la imperiestro. La ekzamenaj paperoj estis presitaj, kaj la presistoj devis resti en la presejo ĝis la fino de la ekzameno. La juĝantoj ne rajtis eniri en la ekzamenon, kie kontrolis specialaj kom-

isiitoj. La juĝantoj kaj presistoj reakiris liberecon tiam, kiam ĉiuj finis sian skribadon sur la ekzamenaj paperoj. La juĝantoj ripetade legis la ekzamenajn paperojn kaj elektis tiujn de la unuaj dek plejsukcesintoj kaj prezentis ilin al la imperiestro por peti ties decidon.

En la tago de publikigo de la notoj de la ekzamenatoj devis okazi solena ceremonio. Imperiestro persone voĉlegis la nomojn de tri *ĝinŝi* de la unua grupo. La unua sukcesinto de la unua grupo estis titolita *ĝuangjŭan*, la dua — *bangjan* kaj la tria — *tanhŭa*. Imperiestro donis al ili oficojn en la Akademio de Literaturistoj. La sukcesintoj ankaŭ de la dua kaj tria grupoj estis



Ŝton-gravuritaj drakoj


titolitaj *ĝinŝi*. Por fariĝi ŝtatoficisto ili devis trapasi plian ekzamenon.

La ŝtata enoficiga ekzameno en la feŭdisma Ĉinio ofte estis ridiga pro absurdaĵoj. Multaj kleruloj sin preparis por ekzamenoj dum la tuta vivo. En Qing-dinastio troviĝis tri centjaruloj inter la ekzamenatoj. 80-90-jaraj ekzamenatoj ja estis pli ofte vidataj.


La lasta kortega ekzameno de la feŭdisma Ĉinio okazis en 1904, en kiu 150 ekzamenatoj estis titolitaj *ĝinŝi*. La lasta *ĝuangjŭan* estis persone elektita de la imperiestro Guangxu kaj la imperiestra patrino Cixi. Oni diris ke la lasta *ĝuangjŭan* Liu Chunlin fakte ne estis la unua plejsukcesinto. Tiutempe regis sekegeco, dum la nomo Chunlin signifas en la ĉina lingvo “printempan pluvadon” kaj “ĝeneralan favoron al la mondo”. Lia nomo estis rigardata kiel bona aŭguro, kaj tre ĝojigis la imperiestran patrinon Cixi. Liu Chunlin gajnis la unuan lokon pro sia nomo. Post tiu kortega ekzameno aboligis la ŝtata enoficiga ekzamena sistemo, kiu daŭris mil jarojn en Ĉinio. ■

Trono de imperiestro en Baohe-halo






Zhonghe-halo (dekstre) kaj Baohe-halo



Memorigaj poŝtmarkoj por la Nacia Tago

de YAN JIN



Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949 estis emisiitaj 7 serioj da memorigaj poŝtmarkoj por la Nacia Tago.

"Memore al la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko" (dekstre de la supra vico) emisiigis en 1949; "Memore al la 1-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko" (maldekstre de la supra vico) emisiigis en 1950; "Memore al la 15-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko" (el tri pecoj, en la dua vico de supre) emisiigis en 1964; "Memore al la 10-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko" (dekstre de la tria vico de supre) emisiigis en 1959; "Memore al la 25-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko" (maldekstre de la tria vico de supre) emisiigis en 1974; "Memore al la 30-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko" (el 4 pecoj, maldekstre de la malsupra vico) emisiigis en 1979; kaj "Memore al la 35-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko" (dekstre de la malsupra vico) emisiigis en 1984.